

Dumonata kultura informilo-esprimilo

Redaktejo: Esperanto, Cargue Sac, F 47470 BEAUVILLE

Unu n-ro: 10 FF. Unujara abono: 60 FF ĝirotaj al:

CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74 M Bordeaux
(mencii same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53.95.40.26



Taŭtaj informoj kaj petoj

La FEDERACIO DE L'ANARKISTOJ (LIBERECANOJ) en BULGARIO (FAB),

havis sian unuan malkaŝan liberan konferencon-kongreson je la 19a kaj 20a de majo 1990, en urbo BG-6100 KAZANLAK, kaj en ĝia grava multflanka rezolucio trovis lokon ankaŭ jena tutanime akceptita teksto :
"FAB energie subtenas TUTMONDAN ESPERANTO-MOVADON, insiste volas, ke la internacia planlingvo ESPERANTO estu regule instruata kaj lernata en ĉiugradaj lernejoj kaj universitatoj en la Mondo, kaj ĝi (Esperanto) estu uzata kiel laborlingvo kie okazas internaciaj kunvenoj kaj renkontiĝoj kun partoprenantoj el pli ol unu etnolingva grupo inkluzive Internacian Anarkistan Federacion, diversajn internaciajn unuigojn, UNESKO, UNO kaj ĉiuj ĝiaj fakorganizoj; rekomendas precipe al ĉiuj anarkistoj ellerni Esperanton kaj uzu ĝin praktike en sia agado por efektiviĝo de la libera, justa kaj senklasa tuthomara sociordo."
Informas : G.L. Damjanov, Makariopolski 7, BG-6100 KAZANLAK, Bulgario.

O.S.I.E.K. (Organiza Societo de Internacia Esperanto-Konferencoj) honoris la japanan verkiston RIHEJ NOMURA, pro lia filologia verko : **Zamenhofa Ekzemplaro**, per la Premio-OSIEK-1990. Ĉi tiu premio estas je 300 ekuoj; ĝi estis atribuita per dubalota voĉdonado de ĉiuj aktivaj membroj kunvenintaj en ĝeneralan asembleon.

ŜAKO kaj ESPERANTO

E.Ŝ.L.I. (Esperanta Ŝaka Ligo Internacia) kungrupigas esperantistajn ŝakludantojn en la tuta mondo. Dum la U.K. en Mainz, 1958, kelkaj ŝak-emuloj fondis EŜLI. Escepte de S-ro Duthilleul (F), ĉiuj fondintoj jam forpasis.

La nuna ligo enhavas almenaŭ 400 geŝakludantojn, ĉefe en orienta Eŭropo, sed ankaŭ en okcidenta Eŭropo kaj en diversaj landoj. La franca fako entenis ĝis nun 20 geanojn, sed post freŝdataj artikoloj en la revuoj "Europè Echecs" kaj "Le courrier des Echecs" ĝi probable rapide duobliĝos.

E.Ŝ.L.I. organizas koresponde multajn ŝakturnirojn, kie la komencantoj kaj la majstroj trovas kontraŭulojn de sama forteco, kaj ĝuas saman plezuron. La uzado de la internacia lingvo ebligas la naskiĝon de multaj amikecoj, ĉar turniro daŭras 3 aŭ 4 jarojn! Pliajn informojn povas doni la franca peranto de EŜLI : Alain LEHALLE, 7 allée des Prés, F-57420 FEY

De PERPINJANO oni sciigas :

Okaze de la Festo de la Libro, la 23an de aprilo, estis ekspozicio kaj disvendado de libroj en la kataluna kaj en esperanto en granda salono dank'al kontribuoj de la estraro de Hispana Centro.

En Argelès-sur-Mer "Amics de l'Esp." ekspoziciis turismajn E-broŝurojn, afiŝojn pri E. kaj ĝia movado, de la 11a ĝis la 17a de majo.

Ĉiun lastan lundon de l'monato okazas elsendo pri E-novaĵoj en Radio Arrèls de Perpignan.

E-kurson elsendas jaŭde kaj lunde Fréquence Sud de Argelès-sur-Mer (skipo de profesoro Benazet).

Raportas la E-Fako de Laika

Amikaro en Eysines (F-33) :

La kursoj rekomenciĝis la 18an de septembro 1989 kun 8 komencantoj.

Du semajnfinaĵ stagoj okazis : resp. 29 ĉeestantoj kaj 15.

400 flugfolioj estis disdonitaj okaze de sporta festo, kaj aliĵoje 250.

Laŭ invito de radio ENTRE DEUX-MERS, ni respondis demandojn de 4 lernantinoj pri Esperanto.

Fine de aprilo, 3 el ni partoprenis vojaĝon al CASTRILLON (Asturio) okaze de la 10a datreveno de la ĝemeligo Eysines-Castrillon. Ni renkontis geesp-istojn el Castrillon, apudaj urboj Avilès kaj Gijon, kaj propagandis kune. Ni faris donacojn al la urbestro i.a. pergamenon klarigantan niajn dezirojn pri la interŝanĝoj inter niaj du urboj pere de Esperanto. Li promesis afiŝi ĝin ĉe la urbodomo. Oktobre, kadre de la ĝemeligo, ni gastigos la hispanajn esp-istojn.



Nia debato :

PERESTROJKO kaj S.A.T. : Ĉu ni estas pretaj?

Dum jardekoj, tiuj, inter la aktivuloj de la laborista movado, kiuj ne laŭdis surde-blinde ĉiujn misfarojn kaj misprezentojn fontantajn el Moskvo, senespere konsideris la t.n. "socialisman blokon" kiel specon de glaciĝinta kontinento, sur kiu la vento de libero ŝajne neniam blovos. En la SAT-movado, eble pli ol aliloke, oni jam de la fruaj jaroj '20 disponis pri sufiĉaj informelementoj por havi relative ĝustan vidpunkton pri la reala situacio soveta kaj orienteŭropa. De la unuaj duboj de LANTI ("Tri semajnoj en Rusio", 1922) ĝis la laste eldonita libro de Karlo Ŝtajner, tra "Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?" kaj "Tra sovetaĵoj" de Petro Dikŝtejn, al kio indas aldoni la nenombreblajn literajn atestojn pli-malpli kaŝe atingintajn la okcidentan SAT-anaron, ja abundis la motivoj, kiujn povis elvoki la stalinismo kaj ties sekvantoj por malpermesi al SAT-eldonaĵoj libere eniri la sovettan paradizon.

Neniam SAT retrovis la anaron kaj viglon, kiujn ĝi ĝuis antaŭ la skismo. Subite nun, preskaŭ 60 jarojn poste, falas la muroj kaj la historia horloĝo, denove streĉita, ekfunkcias oriente, strebante urĝe ŝtopi la malfruojn sur diversaj terenoj politikaj kaj ekonomiaj. Kiaj perspektivoj el tio senvualigis por nia mikrokosma Esperantio, kaj por la ankoraŭ pli eta laborista E-movado?

Spegule al la ĝenerala stato de tiuj demokratiigantaj landoj, kiuj devos solvi unuavice la plej akutajn ekonomiajn problemojn, ankaŭ la orienteŭropaj esp-istoj devos ankoraŭ kelkan tempon atendi antaŭ ol ili povos disponi sufiĉajn materialajn rimedojn por plene ĝui la finfine (re)trovitan liberon sin esprimi, sin organizi kaj rilati kun siaj okcidentaj samideanoj. La tro rapida alsvarmo okcidenten de senmonaj vizitantoj, abonemuloj kaj verkemuloj, riskas ja endanĝerigi la ekziston mem de niaj tro malviglaj okcidentaj E-asocioj. Post la komenca eŭforio povus manifestiĝi laciĝo, eĉ tediĝo, iom simile al tio spertita kaj raportita pri la entuziasmaj sed senhavaj varbitoj el Afriko.

Eĉ kiam la diversaj valutoj orienteŭropaj estos ŝanĝeblaj kontraŭ okcidentaj, ne solviĝos la problemo : nur "riĉaj" orientaj E-istoj povos ĝui vojaĝojn, aĉeti librojn, ĉeesti la multe kostajn kongresojn, kiujn eĉ iuj ordinariaj okcidentaj E-istoj ne povas pagi al si. Ja solidareco estis ĉiam praktikata en Esperantio, aparte en SAT, kaj en la plej malfacilaj cirkonstancoj. Temas nun pri nur transira periodo kaj eblas esperi progresivan pliboniĝon de la situacio : la eldonado de E-libroj, kasedoj, en Orienta Eŭropo, la plimultiĝantaj interŝanĝoj okaze de vizitoj, ebligis al la tieaj E-istoj havi normalajn rilatojn kun okcidento sur pli egaleca bazo.

Efektive, eblas supozi, ke la orienteŭropa E-istaro konsistas el ĝenerale pli junaj homoj ankoraŭ ne tro saturitaj per kulturaj konsumaĵoj, kaj por kiuj la strebado al paco, la respekto al ekologiaj principoj, la solidareco al malsata tria mondo, plu havas gravan signifon. Ili povas tiel stimuli la avangardon de la movado okcidenta.

Ĉu kaj kiel la nuna SAT povas esti la asocio, al kiu nature sin turnos la plej antaŭenemaj, aŭ ĉu tiuj preferos la pli prestiĝan UEA? Ĉu ne forpuŝos ilin la de l' malproksima pasinteco heredita frazeologio kun tiuj nocioj pri klasbatalo, socialismo, kiujn ĝisnaŭze ili aŭdadis en sia ŝlosita mondo? Ĉu ne necesus unuflanke disponigi al niaj orientaj kamaradoj (tiun vorton mi plu opinias uzinda) la diversajn historiajn dokumentojn utilajn por pli

bone kompreni la valoron de la SAT-fundamento kaj samtempe senpolvegi la nunan asocion el ties kadukiĝintaj aspektoj ; alivorte, iom analogie al la tiel fruktodonaj perestrojko kaj glasnosto gorbaĉovaj, konservante el la pasinteco tion plu valoran, adopti pli flekseblan sintenon rilate al ĉiuj penso-fluoj nutranta la aspirojn kaj iniciatemon de la nuna generacio?

(enkonduko de Kribo)

Oksana :

Venis samtage la 34-a ĉenletera enkonduko kaj fasko da gazetoj el Latvio, kun eta akompana vorto sur bildkarto : "La plej populara kanto ĉe ni nun estas jena : "C'est la vie, not for you and not for me". Mi enkonvertigis faskon da anglalingvaj artikoloj pri ĉealtiaj problemoj (plukitaj el brita gazetaro). Tiel funkcias kunlaboro kun mia latva amiko-esperantisto dum monatoj. Kaj kion mi diru pri strategio de SAT lige kun perestrojko, glasnosto? Jene ŝercas nun rusaj emigrintoj en pariza redaktejo de "Rusa penso" : "Tiu perestrojko nin en tombon kondukos!" Kiel? Ĉar laboro multegas. Abundas verkemuloj, abundas eldonaĵoj. "Kiel fungoj post pluvo kreskas". Homoj en orienta Eŭropo vekigis kaj perdas timon. Alispeca timo komencas kapti okcidentajn esperantistojn. Kribo elmontras ĝin : invados orienteŭropanoj, malvigla kaj malforta okcidenta movado ne eltenos superŝarĝon kaj kolapsos... Ĉu vere io tia povas okazi - aŭguri mi ne pretas. Tamen - jam senteblas kunlaboro, freŝa vento. Ĉu vi ne sentas? Prenu en la manojn lastajn numerojn de "Sen-naciulo" (ekz. februaran, kun bonega studo de NikSt pri esperantistoj-viktimoj de stalinismo) - kaj vi vidos ŝanĝojn. SAT-publikaĵoj do iĝos pli variaj, pli interesaj (mi esperas samon pri "Laŭte!"). Gajnos de tio ĉiuj. Nu, vivo ne estos senproblema. Verŝajne venos ankaŭ senmonaj vizitantoj... Mia latva amiko tamen rezignis pri vojaĝo : "c'est la vie..." (kiel en citita kanteto). Anstataŭe li invitas viziti Baltian Esperanto-Kongreson ĉi-somere (en julio). Ŝajnas al mi, ke nun estas tempo veturi orienten, ne okcidenten.

"Laciĝo" kaj "tediĝo" pro multaj eksterlandaj vizitantoj ne minacas kapti orienteŭropan E-movadon! Male ĝi sopiras pli da renkontiĝoj, pli da vizitantoj.

Ĉu al SAT aliĝas (os) "la plej antaŭenemaj"? Malŝategas mi tiajn frazojn. Kiu povas juĝi pri "la plej antaŭen- aŭ malantaŭenemaj"? Gravas ke ĉiu esperantisto havu eblon aniĝi en tiu asocio kiun li preferas. Aŭ resti sen aniĝo en ajna asocio. Ne ĉiuj esperantistoj ŝatas MOVADON. Kelkaj preferas E-kulturon, kran kunlaboron, interŝanĝon de opinioj - sen aniĝo al iuj asocioj. Eĉ sen kongresumado, kio ja ne estas ĉefa afero en vico de kreema esperantisto.

La malnova frazeologio kompreneble forpuŝas, ĉefe - junan generacion. Solidareco - jen la plej taŭga vorto por naŭdekaj jaroj. Kiel ĝi manifestiĝu, en kio konkrete ĝi enkorpiĝu - mi lasas ellabori formojn al SAT-strategiemuloj. En la nuna momento eks. urĝas sendi E-instruilojn en Rumanion (vidu alvokojn en lasta "Laŭte", en "LG"-27 k.a.). Mi persone preferas sendi malnovajn SAT-broŝurojn ktp. al amikoj en orienta Eŭropo, fari ion etan kaj konkretan ĉiutage ol skizi grandiozajn planojn por la tuta asocio. Des pli ke mi trovas tion neebla, konsiderante ke multon el malnova heredaĵo mi malakceptas. Kaj certajn strebojn (imperismon, maskitan sub sennaciismo) mi ĉiam kontraŭbatalos.

Garolo : SENNACIECO SEN PERESTROJKO

Perestrojko : jen neologismo kiu definitive enkondukiĝis en ĉiujn lingvojn, kaj finfine ĝi transdonas nur ideon pri adapto, pri restaŭrado, riparado... flikado. Tio estis la origina ideo de Gorbaĉovo mem fronte al la sankta marksismo. Nu, kiel ĉiuj tion scias io flikita ne longe eltenas. Cetere kaj feliĉe en tiuj kvin jaroj la evoluo de la perestrojko preterpasis la simplan flikadon, kaj eĉ fuĝis de la netuŝebla marksismo. Sendube marksismo estas perfekta doktrino, tion ankoraŭ diris Karlo Ŝtajner post 7000 tagoj da sufero en Siberio, tion ĉiam diris Milovan Djilas eĉ kiam li agnoskas ke ĝi estas tro ideala por la

neperfekta homo... resume oni 60 jarojn post Lanti, en SAT, malkovris ke "tia socialismo" ne konstruiĝis... kaj mi aldonas, neniam konstruiĝos. Kaj jen post la falado de la falsaj "komunismaj" muroj, rekonstruiĝas ĉiuj specoj de malnovaj muroj el la akra monkapitalismo, el la idiotaj naciismoj. Jes, Kribo pravas en la esprimado de siaj duboj, kaj la P.K. de SAT tute trafe en S-ulo n-ro 3 (marto '90) per la alvoko "Al la Tutmonda Laboristaro" montras kiel pli ol iam ajn la kleriga celo de SAT estas grava. Pro tio, mi mem en ĉi tiu letero volas insisti pri la rolo de la ideo, kiu esprimas la "sennaciecon". Mi precizigas : sennacieco, kaj ne sennaciismo. For la ismoj... la doktrinoj.

Mi revenas al Oksana, kiu sendube estas Olga kaj eĉ Orest... kiu timas pro iu sennaciisma imperiismo! Tio laŭ mia kompreno estas absurda, senfundamenta, la fundamento estas en la vera stremenseco de la homoj, kiuj fakte, nekonscie sin fermas en klanoj, sektoj, nacioj, kun sanktaj lingvoj, dioj, religioj, tradicioj, kutimoj ktp.

Mi scias, iam Lanti esprimis ideojn pri forigo, detruo de ekzistantaj homaj valoroj por instali, eble trudi sennaciismon. Sendube kiam Lanti esprimis tion li profunde eraris. La sennacieco estas alia afero, ĝi esprimas la esencajn trajtojn, kiujn ĉiuj el ni denaske posedas : senlingvecon, senreligiecon, senklanecon ktp. Mi scias, tiuj nocioj estas malfacile asimileblaj de la homoj, eble ĉar ili estas tro simplaj. Mi donis tamen ekzemplon en la 33a ĉenletero, kiam mi diris ke al beboj oni ne lernigas, oni ne instruas kiel manĝi, paŝi,... paroli; kio lernigas, tio estas la evoluo en la propra vivmedio. Sekve, al naskiĝanta bebo tute ne interesas kio, kia, kiu estas tiu medio, ĉiu, ĉiuj medioj estas ekvivalentaj, same bonaj... aŭ malbonaj. La homoj ĉie havas la samajn bezonojn, kaj la kontentigo de tiuj bezonoj por la viveltenado kondukas al agoj ĉie similaj, ekvivalentaj, por ne diri egalaj kaj samaj. Estas tiu ekvivalenteco de la homaj valoroj, de ĉiuj homaj valoroj en iu ajn loko de nia finfine malgranda terglobo, kiu estas la fundamento de la nocio pri sennacieco. Estas klare ke la klaniĝo, grupiĝo, naciĝo, kaj fermiĝo en iu ajn aparta homgrupo estas socia, false natura fenomeno

evidente plejofte negativa, kiun la homoj kapablas preterpasi kiel muron, barilon. Mi konas la argumenton, ĉiu rajtas pri nacieco, pri libervola religio, pri identigo al lokaj kutimoj, moroj, kulturaj apartaĵoj ktp. Jes, sendube, mi mem opinias ke la homoj ne kapablas sorbi en kulturo ĉiujn apartaĵojn, ĉiujn formojn de homaj manifestiĝoj... sekve ĉiuj apartaj manifestiĝoj de ĉiu kaj ĉiuj homoj devas esti respektataj de ĉiu kaj ĉiuj. Ne estas la minimuma dubo, ke ĉiu homo "amas" sian naskiĝlokon, sian "patrion"... sed mi ne kapablas kompreni kial tiu homo kiu amas sian patrion, samtempe devas malami la patrion de sia najbaro. Pro la citita ekvivalenteco de la homaj valoroj ĉiuj patrioj, kutimoj, tradicioj estas same amindaj kaj estas la tutmonda interplektado de tiuj homaj valoroj kiu alportas la sennaciecan, senfine riĉan homkulturon tutmondan. Ĉu ĉi tio ne estas klara? Kaj vere dum mi skribas ĉi tion kaj vidas la revenon de obskurantismo, de ŝovinismo en Latvio aŭ Litovio, en Armenio kaj eĉ en Ĉeĥio-Slovakio, ĉar la homoj volas esti ĉu ĉeĥoj ĉu slovakoj, ĉu aliaj bohemoj, sincere mia menso ne plu akompanas tian homan sintenon... ĉar vere estas multe pli facile esti mondĉivitano, sennaciulo ol esti sekta visigoto, kelto ks.

Por konkludi, responde al Kribo, mi estas konvinkita, ke ni en SAT per klerigado povas doni eblecon por ke la homaj mensoj efektive malfermiĝu fronte al la plej primaraj evidentaj kie la perestrojkoj eĉ ne havas lokon. Se tia malfermiĝo ne estas efektivegebla, restas nur unu logika ebleco, rezigni pri ĉio, ankaŭ pri SAT kaj ĉiuj pliaj idealoj.

SUZANNE :

Kiel multnombraj esperantistoj, Oksana miskomprenas sennaciecon - nun oni forigas la sufikson ismo, ĉar pro ĝi tiuj ĉi havas la konvinkon, ke sennacismo temas pri doktrino - ĝi koncernas nur homaranan spiriton. Garolo tre bone klarigis tion.

Liaj trafaj rimarkigoj pri la sinteno de la liberigantaj landoj de la sovetia subpremo - foje, la regionismo havas la saman emon - estas ĝustaj, kaj mi

tute konsentas.

Pri E-movado : ĝi estas necesa, ĉar se neniu zorgus pri presadoj, varbado, propagandiloj ktp., estus nur izolaj individuoj, E-parolantoj, same kiel okazas por la aliaj fremdaj lingvoj. Plie, ĝi estas ligilo.

La kongresoj same estas necesaj, ili estas propagandaj okazaĵoj eksterlande. Dum la kongresoj ni estas informataj pri la asocia administrado. Tiam la anaro konscias pri la sindonemo de tiuj gekamaradoj, kiuj dediĉas multajn liberajn horojn al la disvastiĝo de E. Ja oni povus rebati, ke tiujn informojn eblas legi en niaj gazetoj... Dum tiuj kunsidoj ĉiu el ni, se necese, povas diskuti iajn punktojn. Fakte, la kongresoj eksterlandaj postulas sufiĉe gravan elspezon por multaj el ni, sed estas ebleco por izolita homo konatiĝi kun simpatiaj homoj, kaj la asociaj respondeculoj, kiuj, kvankam ni konas iliajn nomojn, estas kvazaŭ anonimuloj.

Nuntempe en la instruado pli kaj pli oni forigas la nepran kritikemon, por ke la homo fariĝu roboto.

En la aprila "Sennaciulo" "Kontaktoj antaŭ Perestrojko" : Se ĉiuj sovetianoj samopinias - tio estas miskompreni la kritikemon - mi demandas min, ĉu la klerigado de SAT malfermos tiajn mensojn.

Grava laboro!

SAT praktikas solidarecon al la gekamaradoj, kiuj havas malbonajn vivkondiĉojn. De multaj jaroj SAT sendas lernolibrojn al senmonaj E-lernantoj, ekz. en Afriko, eĉ en orientan Eŭropo antaŭ la nunaj eventoj.

Laŭtulo el Ĉeĥoslovakio :

Por ni restis du grandaj problemoj: liberaj balotoj kaj plena foriro de la sovetia armeo. La samaj problemoj estas ankaŭ en aliaj ekssocialismaj landoj en centra Eŭropo. Poste ni devos supozi komunan Eŭropan domon sen militblokoj, kie ni ĉiuj celos al komuna sekureco. (Ĉu kontraŭ Ĉinio?)

Ĉar rapide ŝanĝigas ne nur la politika sed ankaŭ la ekonomia situacio, oni povas fondi diversajn privatajn koo-

perativojn aŭ privatajn entreprenojn, kie homoj denove lernos labori. Se ni pripensis, kial en socialismaj landoj estas malpli alta vivnivelo ol en aliaj landoj, ni devas diri, ke tio estas pro tio, ke en socialismaj landoj multaj homoj faris senutilan laboron kaj multaj faris nenion, eĉ ili ricevadis salajron. En kapitalismaj landoj tio estus normalaj senlaboruloj. Multaj ŝanĝoj atendas nin, se ni celos eniri Komunan Eŭropon.

Ankaŭ Esperanto kaj Esperantistoj povas helpi al tiuj celoj. Ni havas malgrandan avantaĝon pro niaj multjaraj kontaktoj, do ni scias ion pli pri la "libera mondo". Sed ni devas ankaŭ multe klarigi al niaj amikoj, kio estis iama socialismo sub gvidado de la komunista partio en nia lando.

(Ndlr. : Kvankam tiu ĉi letero alvenis al la red. ekster la kadro de ĉenleteroj ni opinias ĝin interesa por tiu nia debato.)

PAKO :

Ŝajnas evidente, vide la rezultojn de la balotadoj en Orienta Germanio kaj Hungario, ke asocio apoganta klasbatalon, simpatianta socialismon kaj tre kritikema al kapitalismo, ne povas esti alloga al orienteŭropaj esp-istoj. Sed tio povas esti nur ŝajno.

Eble ili ne plu volas *socialismon*, eĉ ne la okcidentan social-demokratian surogaton, sed certe tie estos sindikataj kaj laboristaj movadoj, kaj ties E-voĉo estas SAT. Tie estos personoj emaj labori por la libereco, por la subprematoj, la persekutatoj, la ekspluatatoj, kontraŭ la imperiismo kaj la militarismo, por la homaj rajtoj, por la solidaro ; kaj ankaŭ (se ne diri precipe) ĉio ĉi estas SAT. Kaj ĉio ĉi havas nenian rilaton kun la frazeologio de la komunismaj reĝimoj. Necesas nur ke ili vidu nin kiaj ni vere estas, ne kiel simplan aron de *socialistoj*.

UEA havos kompreneble sian gravan lokon. Ĝi havas la avantaĝon neniel odori socialisme kaj ne esti makulita per la komunisma frazeologio, se ne paroli pri la puĉo en PEA kaj ties jubilea kongreso.

Kompreneble la ekonomia situacio estos granda baro,

sed mi supozas, ke tio ne multajn lacigos. Mi komprenas la enuigon de afrikaj kaj amerikaj esperantistoj, kiuj krom malriĉaj estas ankaŭ tre for de la tro eŭropa Esperanto, sed tiu lasta problemo ne aldoniĝas al tiuj de orienteŭropanoj. Krome, se ili ne povas kongresi okcidente, okcidentanoj ja kongresu oriente.

Kion mi timas ne estas ĝuste pri SAT, sed pri esperanto mem. Esperanto kaj ties movado estis ĝis nun forte apogataj de la tieaj oficialaj instancoj, tiel ke ili subtenis ĉiujn asociojn kaj aranĝojn. Sed en Pollando, por ekzemplo (tion diris polaj vizitantoj en mia urbo), tio estas jam historio. La likvido de la Granda Frato Ŝtato havas do sian malavantaĝon.

Laŭ mia opinio oni ankoraŭ ne povas antaŭvidi kio okazos. La ŝanĝoj estis kaj estas tre rapidaj, kaj oni ege riskas erari en ties interpreto. Sed, se sin difini, mi konfesu ke mi estas optimisma. SAT disvastiĝos tra orienta Eŭropo, simple ĉar ne eblas stati pli malbone ol nun. Aliflanke, eĉ se la individuaj aliĝoj ne tre kreskos, la eventuala apero de LEA-oj estas grava sukceso.

Fine, permesu ke mi komplete aldonu kelkajn ridajn vortojn por tiuj, kiuj dum tiom da jaroj dediĉis siajn E-voĉojn kaj E-skribilojn al la kantado de la dogmoj de siaj mastroj. Povraj! Pri kio nun cerbumu iliajn modleblaj cerboj? Ĉu iliaj pulmoj povos spiri la nun kirlantajn elmoskvajn ventojn? Kiajn notojn iliaj voĉoj kantu? Kiun partituron ili nun ludu? Kiu estus ilia nordo? Ĉu Pekino? Ĉu longan tempon?

Ho amikoj! Ni ĝoju nun, kiam ni povas. Tempon ni havos poste por bedaŭri.

patriko :

mi ne estas membro de SAT. eĉ la tiel nomataj sennaciuloj ne pretas rezigni pri sia nacieco kaj ties avantaĝoj.

mi ne estas socialisto. kapitalismo estas natura, socia konstruaĵo historia kaj kolektiva, al kiu ĉiuj kontribuas kaj pri kiu ĉiuj respondecas. socialismo estas mensa projekciaĵo kiu profitigis nur monstrulojn kiaj lenin, stalin, trocki, musolini, hitler, mao, pol pot, kastro, ĉauĉesku,

honeker ktp...

mi ne estas esperantisto. mi uzas esperanton same kiel aliajn lingvojn. mi opinias ĝin unu lingvo plia, kio ne helpas solvi la babelproblemon, kaj mi plejofte preferas alian lingvon kiam eblas elekto.

pro ĉio ĉi, mi ne sentas min vere koncernata de la debato sed mi provos ruli la radon de la muelejo per kelkaj rimarkoj kaj opinioj eĉ se eksterdebate :

- perestrojka kaj glasnost, t.e. rekonstruado kaj publikigado, estas kaptila artifiko por ni, okcidentuloj, kaj kies ostaĝoj estas la orienteŭropanoj. ĝi konsistas el krei la kondiĉojn de nerevenebla dependeco per iluzio ke sovetio bezonas nian helpon kaj indas nian fidon.
- eŭropo ja estas okcidenta ekstremaĵo de azio, kies limo orienta estas vladivostok.
- internaciismo estas fantaziaĵo, same kiel tutmonda registaro kun oficiala lingvo esperanto. la 21a jarcento, ekstarigos mondiskalan arenon de superpotencaj naciegoj/ŝtatoj ĉirkaŭ lingva asimilado (angla, ĉina, rusa...)
- ni, okcidenteŭropanoj, posedas kulturon kaj lingvojn tra imperiismo internaciigintaj kaj kiujn ni dividas kun alikontinentanoj, ĉefe en ameriko, kie ili iĝis naciaj kaj naciegaj.
- esperanto estas uzata de sovetia kaj ĉinia ŝtatoj propagandcele ĉar ili ne disponas pri propra internacia lingvo. la utopiaĵo esperanto povas maski totalistajn realon kaj planon.
- la latina lingvo daŭre influas super la evoluo de la ĉefaj lingvoj eĉ nelatindevenaj (angla, rusa, esperanto). la angla lingvo kreskis francigante kaj poste latinigante. la latindevenaj lingvoj estas pli kreopovaj, pli internacie kompreneblaj, pli facile prononceblaj, pli rapide kreskantaj, pli klaraj, simplaj kaj regulaj ol ĉiuj aliaj lingvoj, la esperanta strukturo ne rezistas iliajn neologismojn.

| statistikoj (milione) : | 1988 | 2000 |
|-------------------------|---------------------------|----------|
| 1. ĉina | 825 (nur skribe) | |
| 2. angla | 431 | 431 |
| 3. hinda | 325 (nek duono de hindio) | |
| 4. hispana | 320 (19 en usono) | 435 (32) |
| 5. rusa | 289 (?) | |

| | | |
|----------------------|-----|-----|
| 6. araba | 187 | |
| 7. bengala | 178 | |
| 8. portugala | 169 | 210 |
| hispana + portugala: | 489 | 645 |
| 9. indonezia | 135 | |
| 10. japana | 124 | |
| 11. germana | 118 | 77 |
| 12. franca | 117 | 166 |
| esperanto | 1 | ? |

en konkludo, oni povas rimarki ke la hispana lingvo estas multe pli parolata ol la aliaj latindevenaj lingvoj kaj ke post deko da jaroj ĝi superos ankaŭ la anglan (ĝi jam superas en la amerika kontinento kaj duarangas en usono...). ankaŭ estas rimarkinde, ke la hispana ne estas lingvo nacia de superpotenco kaj pro tio ne estas suspekt-ebla je imperiismo, ĝi do povus roli kiel internacia komunikilo...

JAKELINO :

OPTIMISTA REAGO DE REVENINTO AL S.A.T.

Mi iam kutimis iri al SAT-kongresoj, sed pro diversaj motivoj mi ĉesigis dum pluraj jaroj tiun partoprenon. Post interrompo, mi reakiris tiun kutimon en 1989 kaj partoprenis en la kongreso de SAT en Illertissen. Min frapis la internacieco de la partoprenantaro : unufoje mi vidis en SAT-kongreso homojn el ĉiuj kontinentoj. Mi kutimis, ke en SAT oni diskutas pri temoj, kiuj interesis francojn dum la Tria Respubliko (inter 1870 kaj 1940, noto por laŭtuloj, kiuj ne konas la francan historion). Tiu etoso ne tute malaperis. Ekzemple, ĉu aliajn legantojn de **S-ulo** ol la francajn interesas debato pri la temo : ĉu knabinoj rajtas surhavi kaptukojn en mezlernejoj? Tamen, en Illertissen, oni parolis pri aliaj temoj. Bavario estas loko, kiu en julio 89a ankoraŭ ne estis facile atingebla por homoj el ĉiuj landoj. Tamen la etoso jam estis internacia. La decidon kongresi en 1990 en Aŭstrio SAT-anoj faris antaŭ la malkonstruo de la muro de Berlino. Ĝi nun montriĝas tre oportuna : al Aŭstrio eŭropanoj okcidentaj kaj orientaj rajtas iri sen vizo. Mi rigardis la liston de parto-

prenontoj, kiu aperis en **Sennaciulo** : venos multaj homoj el orienteŭropaj landoj. Mi do fidis, ke iom post iom la etoso de SAT evoluos, kaj ke ĝi fariĝos eĉ pli internacia, ol ĝi jam estis en Illertissen.

Ankoraŭ estas granda ekonomia diferenco inter okcidentaj kaj orientaj landoj de Eŭropo. Certe estos eĉ pli da almozpetantoj, ol hodiaŭ. Ĝis nun, almozpetojn mi ricevis de Afrikano, kiu volis abonon al **Jeune Afrique**, kaj de du poloj. Unu rekte petis, ke mi sendu iom da dolaroj. Mi ne scias, al kiom da homoj li sendis la saman leteron. Se multaj efektive sendis iom da dolaroj (kiel mi faris), li eble sukcesis kunigi la sumon necesan por rajti iri al okcidento (intertempe Pollando ŝanĝis siajn leĝojn pri vojaĝoj eksterlanden). Alia polo rakontis al mi, ke li kolektas monbiletojn, sed, strange, nur okcidentajn, kaj nur tiujn, kiuj nun validas. Do li sendis al mi la plej etvalorajn polajn biletojn, kaj petis interŝanĝon por la plej etvaloraj francaj biletoj. Mi respondis al li, ke ne eblas kompari 100 zlotojn kun 20 frankoj, sed tamen pro karitato sendis al li bileton de 20 frankoj. Mi antaŭvidas, ke tia almozpetado kreskos. Mi iam klarigis, kia ĝeno estas peto pri invitiloj : oni devas sin devontigi pagi la kostojn de resanigado de la gasto, se li malsaniĝos aŭ havos akcidenton. Nu, ĝis nun mi ricevis averaĝe 4 tiajn petojn en ĉiu jaro. Mi antaŭvidas, ke la nombro kreskos (fine de aprilo mi estis ricevinta 2 tiajn petojn de post la komenco de la jaro). Mi decidis, ke nur al bofamilianoj kaj amikoj mi sendos invitilojn. Krome, invitilojn mi sendos al tiuj, kiuj povos prui al mi, ke ili havas asekuron validan por Francio. Se mi sendus invitilojn al ĉiuj petintoj, statistike iu el ili devus malsaniĝi ĉe mi. Tio rezultas el kalkulo pri probableco. Tiam kalkulon enkondukis Blaise Pascal, kiu naskiĝis en la urbo, kie mi eklernis Esperanton. Unu el la invitilpetintoj de la nuna jaro trovis mian adreson en la adreso de la Amikeca Reto, do efektive en adresaro ligita kun SAT. Pli kaj pli da SAT-anoj devos reagi al tiaj petoj. Utilus do, se okcidentaj SAT-anoj diskutus inter si pri la konduto havenda kun gekamaradoj el aliaj landoj.

Ĉu la frazeologio pri klasbatalo mallogos orienteŭropajn esperantistojn? Sed ĝi jam mallogas okcidentajn gejun-

ulojn, kiuj esprimas sian interesigon pri aliaj temoj : ekologio, homaj rajtoj, malarmado, ktp. Estis jam antaŭ la ŝanĝoj en Orienta Eŭropo konflikto en SAT inter tiuj, kiuj nenion volis ŝanĝi, kaj SAT-junulfakanoj, kiuj volis enkonduki tiujn novajn zorgojn, eventuale per ŝanĝo de la statuto aŭ de la nomo de la asocio. Nu : ekologio, homrajtoj kaj malarmado estas temoj, kiuj tre interesas orienteŭropanojn? Estas do, ne konflikto inter oriento kaj okcidento, sed konflikto inter generacioj.

Kiaj orienteŭropanoj povas interesiĝi pri SAT, Mi opinias, la kokritoj! Kiam mi aŭdis, ke GDR-anoj manifestacias por sia libereco, mi tre ĝojis. Mi tre elreviĝis, kiam mi konstatis, ke la rezulto estas amasa voĉdonado por la partio de Kohl kaj lia germana marko. Kie estas la homoj, kiuj instigis la ŝanĝojn? Volonte mi diskutus kun ili, ki al ne en la kadro de SAT? Certe ili estas tiom seniluziigitaj, kiom mi, kaj estus interese paroli pri la "komuna eŭropa domo" el alia vidpunkto, ol tiu de sinjoro Kohl. La unuigitan Germanion regos CDU, kaj oni povas antaŭvidi, ke ankaŭ aliajn landojn de la "komuna eŭropa domo" regos la tiel nomata "kristandemokratio". Tiuj, kiuj deziras alian Eŭropon, sed sen reveno al la stalina epoko, devas unuigi. Kial ne per Esperanto? Kaj se la diskutoj okazos per Esperanto, la normala loko por tio estas SAT.

Tri rimarkoj :

- ne ĉiuj laŭtuloj estas SAT-anoj. Tiu debato devus okazi en SAT-gazeto, ne en **Laŭte!**
- SAT-ano neniel devas esti sennaciulo. Mi estas franca.
- ekzistas en la vasta mondo aliaj kontinentoj, ol Eŭropo.

J.G. :

Nun en la orienteŭropaj landoj la politika situacio estas komplete konfuza. Eĉ la plej gravaj fakuloj pri la problemoj de tiuj landoj (la t.n. "kremlinologoj") ne povas fari prognozon pri la evoluado dum la venontaj monatoj.

En Rumanio la miksitaj opozicioj volas forpeli la nunajn regantojn, inter kiuj parto partoprenis la Ceaucescu-reĝimon. Ĉu la balotoj okazos la antaŭviditan daton? Ĉu tio klarigos la situacion? En Sovetio Gorbaĉov provas konduki

sian ŝipon inter la obstakloj, kiujn metas antaŭ lin la konservativuloj, kiuj ankoraŭ regas multajn administraciajn postenojn kaj la radikaluloj, kiuj volas aktivigi Perestrojkon aŭ komplete forbalai la reĝimon, sed ŝajnas ke ili ne kapablas proponi koheran alternativon. La lastaj eventoj dum la Unua de Majo en Moskvo montris ke Gorbaĉov hezitas kaj ne bone scias kian sintenon adopti.

En G.D.R. kaj Hungario la situacio ŝajnas pli klara: la dekstraj partioj gajnis la balotojn kaj tiuj landoj evoluos verŝajne al liberalisma kapitalismo laŭ la modelo de F.R.G. En Ĉekoslovakio, kie okazis la "velura Revolucio", ekzistas du tendencoj ĉe la nunaj regantoj: Dubĉek, kiu volus konservi parton de la socialisma sistemo sed renovigita, demokratiigita, kaj aliaj, kiuj volus demokration laŭ la okcidenta formo. En Bulgario ĵus komenciĝis la ŝanĝoj kaj la komunista aparato regas ankoraŭ parte la landon. En Pollando estas provizora interkonsento inter la komunistoj kaj regas la Respublika Prezidento kaj la opozicio, kiu partoprenas la povon, celante ekonomiajn plibonigojn.

Konklude : Oni povas konstati, ke la situacio estas tute malsimila laŭ la landoj kun malfacila prognozo por la estonteco. Ankaŭ ĉe la esperantistoj de la orienteŭropaj landoj la situacio estas konfuza.

En Hungario kaj Bulgario, la registaro samtempe kontrolis kaj helpis la E-movadon per subvencioj, enkonduko de Esp-o en la lernejojn ktp.

Ekzistas sufiĉe multnombraj esperantistoj, ĉar esperanto estis rimedo por havi kontaktojn kun la okcidentaj landoj. Kia estos la sinteno de la novaj povoj rilate al Esperanto? Estas la problemoj ankaŭ pri vivnivelo, antaŭvidita senlaboreco ktp, kiuj malhelpas la tieajn kamaradojn.

Ĉu SAT povos profiti de la nova situacio? Nun SAT povas libere ekzisti en la orienteŭropaj landoj, la gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj sen problemoj cirkulas. En Sovetio kaj Ĉekoslovakio novaj aliĝoj alvenas. Tio dependas de diversaj faktoroj: aktiveco de la peranto, sinteno de la

tieaj esperantistoj rilate al la sociaj movadoj: pacistoj, ekologiistoj... kiuj komencas organiziĝi kaj povas esti favora tereno por sendogmema SAT.

J.C. :

Kvankam atentindaj, la materia (mono, materialo, ktp) kaj administraciaj (funkciado, interŝanĝoj) aspektoj de SAT ne estas, laŭ mi, la plej zorgindaj. Solvoj ĉiam estas troveblaj.

Sed por tio plej gravas almenaŭ unu kondiĉo: la spiritostato, pri kiu insistis nia amiko Kribo en la du lastaj paragrafoj de sia enkonduko.

Oni povus ĝin tiel resumi: informo - vereco - solidareco - fleksebleco.

Ĉar ne sufiĉas komuniki. Ankaŭ necesas, ke la komunikaĵo estu vera. La decembraj eventoj en Rumanio tion laŭte sciigis al ni.

Pli ol ĉiam necesas informfontoj vere sendependaj, ideologie kaj materiale. Kaj aperas, ke ĉiu informo estu "ekologia", t.e. plejeble kalkulanta kun ĉiuj sekvoj de agdecido. Ĉu tie ne kuŝas ebla rolo por SAT?

Unu ekzemplo: pariza advokato, kreis asocion I.R.P.E. - Reinforma Instituto por Orientaj Popoloj. Ĝi disponigas informajn tekstojn en la enlanda lingvo de ĉiu centreŭropa petanto.

Por fini, du privortaj sugestoj.

- Eble bonus, ke SAT momente flanklasu aŭ diskrete uzu la vorton "kamarado". Ĉar tre probable ĝi ne same sonas por SAT-ano kiel por centreŭropa loĝanto superstrate "kamaradigita".

- La dua koncernas "Orient-". Ŝajnas, ke tie oni ne tre ŝatas tiun vorton. Ĉeŝa amiko iel proteste rimarkigis al mi: niaj landoj ne estas oriente sed centre.

Jen eble du etaj okazoj "flekseble senpolvigiti".

Nicole D. :

Mia kontribuo sin limigos je esprimado de pensoj, kiujn la temo instigis al mi.

Pli ol iam ajn estas tendenco ĉion miksi, estas vera konfuzo ne nur en la "frazologio" sed ankaŭ en la konceptoj.

Malpli da homoj aktivis por progresigi la vivkondiĉojn de la plimulto, por sendanĝerigi la tutan vivon sur la tero. Individuismo disvolviĝas, pro multaj kialoj...

La vortoj devas trovi siajn aŭtentikajn sencojn, ne necesas multe paroladi, skribadi, sed sincere praktiki siajn ideojn, agadi, eĉ se modeste.

"Perestrojko" eble estas tio : ne mensogi al si, nek al la aliaj, ne deziri esti modelo sed ne subtaksi sin.

SAT estos kio efektive SAT-anoj estos : akceptema, solidara, tolerema, progresema, se tiajn kvalitojn ni vivigas, kulturamas...

ĴANSEB :

La enkonduko de Kribo aperigas, i.a., jenajn demandojn:

1. Kiel organizi la esperantistan solidarecon inter malsamaj landoj, por ke ne estu nur unudirekta interŝanĝo?
2. Ĉu SAT devas ŝanĝi sian frazeologion por ne forlogi la orienteŭropajn esperantistojn?

Ekvilibras interŝanĝoj

La unua demando estas ĉefe praktika problemo. Kompreneble, povas esti solidareco inter la plej kaj malplej riĉaj, sed se ĉe unu flanko estus nur idealistoj kaj ĉe la alia ĉefe personoj logataj de materiaj avantaĝoj, okazus tia laciĝo, kian Kribo anoncas : la okcidenta movado bezonas viglajn, praktikemajn, junajn kaj eble iom malpli idealismajn homojn, kaj ne filantropio logas tiajn personojn.

La solvo povas esti organizado de la movado, tiel ke ambaŭ flankoj trovu sian profiton. Tiel la movado funkcius per si mem, sen ke nur bonvolemluloj puŝas ĝin de malantaŭe. Ekzemple, orientaj landoj povas organizi restadojn, eldoni librojn, revuojn, ktp, por ke mono iru al ili. Tio estus ankaŭ ekzemplo por la okcidenta movado.

Evoluo de vortoj

La dua demando estas pli filozofia, sed interese, ĉar ĝi tuŝas tre gravan problemon pri nia lingvo. Ĉu SAT-anoj

devas plue sin internomi "kamaradoj" por eviti la flanksignifon, kiun tiu vorto havas en iuj landoj? Kion signifas ekzakte "kamarado" EN ESPERANTO? La vorto, sincere uzata de iuj en la komenco, iom post iom "lignalingviĝis", kaj nun estas DU sencoj por tiu vorto : la sincera kaj la formala. Do, la demando : ĉu la senco de vorto rajtas evolui, en esperanto? Ĉu tiu evoluo devas esti paralela al evoluo de responda vorto en naciaj lingvoj?

Iuj diros : "Esperanto estas viva lingvo. Do la vortoj devas evolui." Sed eblas respondi "Kiu evoluo?". Du kazoj povas esti : Aŭ la vorto esprimas evoluantan aferon, ekz. aviadilon. Tiu-kaze la vorto "aviadilo" prinomas la plej novajn aviadilojn. Aŭ la vorto rilatas kun afero, kiu malsame ŝanĝiĝas laŭ landoj kaj lingvoj. Tiukaze, la vorto devas ne ŝanĝiĝi, kaj oni devas uzi novan vorton, ekde kiam oni ekkonscias pri nova senco.

"Kamarado" esprimas ian amikecon inter SAT-anoj. Ĝi estas esperanta vorto, kiu enhavas tiun ideon, ne nepre la traduko de "camarade", "comrade", "kamerad" aŭ "tovariĉ". Se tio okazas, estas nur hazarde. Se la signifo de unu el ili ŝanĝiĝas, oni do kreu alian vorton por esprimi la deflankiĝintan sencon, ekz. "tovariĉo" aŭ "sampartiano".

Tiu afero havus flankavantaĝon : Se iu SAT-ano nomas vin "kamarado" kaj vi dubas pri lia sincereco, eblas respondi al li : "kamarado, aŭ nur sammovadano?"

EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio)

F-31450 Donneville (Francio) Tel.61.81.95.65

samtempe anoncas :

1. Aperigon de **ROK-GAZET'** : La numero 0, modernaspekta, enhavas 28 abunde ilustritajn paĝojn.
Abono por 4 numeroj jare : 100 FF
 2. Publikigon de disketo kun 4 pecoj da rokmuziko (Amplifiki, La Rozmariaj Beboj...).
 - Prezo : 29 FF (inkluzive de sendkostoj)
 3. Kreon de sia eldonejo : VINILKOSMO.
- Ne nur gratulu, sed ankaŭ plej efike subtenu per mendoj kaj abonoj!

NIKOLETO

La du domoj frontis unu la alian en la mallarga strateto. Nikoleta estis vidinta la junulon ĉe la fenestro de lia dormĉambro, kiam ŝi alproksimiĝis al tiu de sia kuirejo. Ĉar lia dormĉambro troviĝis pli malalte, ŝi estus povinta el la kuirejo rigardi en ĝian internon. Versajne pro tio aŭ pro ia retenigo, li ne salutis ŝin aŭ ŝian patrino kaj tuj retiriĝis aŭ fermis la fenestron ĝis ilia malapero. Versajne ankaŭ pro fremdeco, li ne konsideris inda aŭ enda la saluton.

Kaj jen, unu matenon, kiam Nikoleta ellitiĝis pli frue, por fintajpi leteron antaŭ la oficeja laboro, aŭdiĝis kriaĉanta voĉo de virino sur la strateto. "Nur plebanino ne edukita povas tion fari", pensis Nikoleta kaj malfermis la fenestron por esplori, kio okazas. De tie ŝi ekaŭdis Lucianon, la ripariston de elektraĵoj dmpurigiloj, respondi al virino ankaŭ ŝi ĉe fenestro: "Junulo fartas malbone". Kaj Nikoleta diris al si mem: "Vere, tute ne edukita homo povas tiel bruaĉi pro malsano de juna filo. Ĝenerale nenio grava okazas al junulo, kiu subite fartas malbone. Kial do tiu patrino kriaĉas?". Sed baldaŭ Nikoleta devis reiri al la fenestro, ĉar la kriaĉoj rekomenciĝis. Kio nun? La Ruĝkruca aŭtoĉaro estis antaŭ la pordego de tiu familio. Vere, io grava okazis! Nikoleta ankoraŭ ne sciis, ke tiu junulo estas ŝia najbaro kaj ke li nomiĝas kiel ŝi.

Nikoleta sciis ĉion post la reveno el la laboro. Teresa, la najbarino de la dua etaĝo, proponis viziti la malfeliĉan familion. La ploro de la patrino transiris la strateton kaj eniris la kuirejon de Nikoleta. La singultoj nun estis kiel flustrado, sed tiel pikantaj la koron, ke eĉ la okuloj de Nikoleta fariĝis malsekaj.

Do, la du virinoj eniris la pordegon de la fronta domo kaj Nikoleta miris pro la beleco de la korto, kies ekziston ŝi eĉ ne supozis. Versajne tie iam loĝis nobeluloj. La postsignoj vidiĝis malgraŭ ke modernaj fuŝaĵoj rompis la antikvan harmonion. Por atingi la hejmon de Nikoleto necesis supreniri eksteran ŝtuparon, nun tute novan, kiu kondukas ankaŭ al bela loketo, por ĝui la posttag-

mezojn aŭ la vesperojn. Certe tie sidis ankaŭ Nikoleto.

La apartamento - iam ĝi konsistis el unu nura granda ĉambro - estis plenplena de homoj. Neniu sciis, pro kio Nikoleto mortis. Tiuj homoj rakontis, ke en la mateno, kiam Nikoleto ellitiĝis kaj vokis la patrino, li tuj falis teren. Tiuj homoj rakontis ankaŭ, ke ĝis la noktomezo Nikoleto promenadis kun la patrino kaj la fratino, kaj gustumis glaciaĵojn. Estis la 23-a de junio. Absolute oni ne povus antaŭvidi la subitan morton de la junulo. Nikoleta kaj Teresa miksiĝis inter tiuj homoj, por aŭskulti. Kaj Osvaldo, la aŭtomobilriparisto, diris, ke li akompanis Nikoleton kun la patrino al la hospitalo; ke li mem malsupreniris la ŝtuparon kun la junulo sur la ŝultroj, laŭ li jam mortinta. Teresa eniris la ĉambron, sed Nikoleta ne volis vidi la junulon sternitan sur la lito. Ŝi rigardis nur la plorantan patrino, kiun la patro konsolis. Tiu konsolado de malklera homo estis delikata kaj eĉ pli kortuŝa ol la ploro de la patrino mem.

Je la malfrua vespero, kiam jam noktiĝis, Nikoleta ne alproksimiĝis al la fenestro de sia kuirejo, pro timo vidi tra la kurtenoj de la ĉambro, heligita per elektra lumeto, la korpon de la mortinto. Sed la ĝemoj de la patrino kaj la suspiroj eniris tra la mallumo de la kuirejo.

Malgraŭ tio, ke ŝi ne ŝatas partopreni funebrojn, Nikoleta la venontan matenon sentis la subitan impulson por la ĉeesto. Tiuj, kiuj ne sekvis la funebranton, staris ĉe la du flankoj de la apuda strato sub pala suno kaj rigardadis kun malgaja mieno. Ankaŭ hundo rigardadis, eble por demandi per okuloj la kialon de tiu eksterordinara atmosfero, disvolviĝinta en la plej profunda silento. Nikoleta sekvis la aliajn. En la preĝejo ŝi sidis apud la hela ĉerko kun skulptitaj figuroj. La patrino preskaŭ svenis kaj la virinoj ĉirkaŭis ŝin kaj helpis per ventumiloj. Nikoleta preĝis kaj la unuan fojon ŝi sentis amikecon por tiu fortika junulo 21-jara, kiu neniam salutis ŝin, kiun ŝi neniam salutis. La kompatado por lia frua morto kreis kamaradecon. Strange, nur nun Nikoleto komencis vivi! Kiom da fojoj, dum la pasintaj jaroj, ŝi aŭdis lin voĉkrii, ludante kun aliaj infanoj?

Revenante hejmen, la najbarino de la tria etaĝo, nome la maljuna Ida, aliĝis al ŝi. Ili paŝis en la mallarĝan straton, kie troviĝas la domo de Nikoleto. "Kia bedaŭro, ke li mortis tiom juna! - diris Ida - kaj tiel subite!... Nun alia morto... baldaŭ okazos... ĉar maljunulino delonge malsana pro kancero estas je siaj lastaj spiroj. Kiom penas ŝi por morti! Kaj la junulo mortis tiel facile..." "Jes, respondis Nikoleta, - kiel kruela ofte estas la vivo!"

Lina Gabrielli

Davide Melodia :

KONVERTI ?

NE, KUNLABORI.

Ve al la homo, kiu celas konverti alian homon al sia propra kredo, kredante, ke li agas sankte kaj save!

Li ne konscias, ke li metas sin mem super la proksimumon kaj ke li iel lin perfortas. Krome, malofte sanaj kaj daŭraj fruktoj naskiĝas el la duboj kaj krizoj, kiujn tio kaŭzas.

Homrespekto kaj karitato moviĝas en multaj aliaj lokoj, ol tiu de spirita orgojlo.

Se unu konvertiĝas, cent obstinas en sia vojo kaj fermiĝas, akriĝas siajn konvinkojn sen ilin pliprofundigi aŭ eventuale korekti. Tia estas ĝenerale la reago al prozelitismo.

Ĉar la Spirito blovas kie ĝi volas kaj kiel ĝi volas, certe Dio volis sin manifesti diversmaniere al diferencaj homoj, kaj ne estas rolo nia juĝi, kondamni aŭ elimini tiujn diferencojn.

Se ni estas absolute konvinkitaj, ke nia religia elekto enhavas ion esencan transdonendan al nescianto, pli bone estas montri ties bonegecon modele ol pere de parolfluo. Kaj ju pli la modelo estas humila kaj diskreta, des pli da povo ĝi havas por konvinki kaj maldonodi la ligojn de plurjarcentaj tradicioj aŭ estingi la akriĝintajn polemikojn. La cetero estas de Dio.

Esence estas, ke ĉiu pliboniĝu kunlaborante al la komuna kreskado en diverseco.

esperantigis Jakelino



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

Nacio kaj ŝtato

Jakelino : Valo konfuzas nacion kaj ŝtaton. Same la plimultaj francoj.

- Kara Jakelino, ne nur Valo kaj francoj faras tiun konfuzon.

Multaj naciistoj en la mondo, konsciaj pri sia aparteneco al unu nacio, volas fari el ĝi unu suverenan ŝtaton.

Kiam Hitler unuafoje eniris en Vienon, mi aŭdis per radio la Vienan popolamason unuvoĉe skandi

Ein Volk, ein Reich, ein Führer!

(unu popolo, unu regno, unu gvidanto!)

Nun la du germanaj respublikoj reunuiĝas en unu ŝtaton.

Inverse, la baltaj respublikoj kaj kelkaj aliaj volas disigi de Sovetio kaj refariĝi suverenaj ŝtatoj. Sama tendenco manifestiĝas en la jugoslava federacio. Ĉie estas elvokata la fama principo pri nacieco, iniciatite de la franca revolucio kaj disvolviĝinta en tuta Eŭropo dum la XIX-a jarcento. Nun eĉ en la franca "nacio" vekiĝas apartaj naciismoj : korsika, vaska, bretona, kiuj postulas sendependecon kaj ŝtatan suverenecon.

Dume kelkaj plurnaciaj konfederacioj sukcesas konservi pacan, eĉ harmonian kunekzistadon inter diversaj etnoj: Svisio, Brazilio, Usono.

Sed vidu, kiel multaj eŭropanoj, korigitaj al siaj respektivaj nacioj, malvolonte konsentas pri unuiĝonta Eŭropo. Ili almenaŭ restas alkroĉitaj al la nocio "Eŭropo de l'patrioj", kara al Degol, en kiu ĉiu aparta nacio konservus ĵaluze sian tutan suverenecon : tia Eŭropo

estus ja nur ia asocio de suverenaj naci-ŝtatoj. Same kiel la nuna UEA estas federacio de naciaj asocioj, male al la unua UEA de Hodler kaj Privat, kiu estis sennacieca kiel la nuna SAT.

El mia profesia sperto

Mi rakontis aliloke* pri la revolucio alportita en la kine-
tekniko kiel en la kinoarto de la enkonduko de sonfilmoj,
en la jaroj 1927-1928.

Ce Pathé-Cinéma, en la nokto de merkredo al ĵaŭdo,
ĉiusemajne oni kopiis la aktualaĵojn je multaj ekzempleroj
morgaŭe dissendotaj en tutan Francion. Oni uzis por tio
kvaroblajn kopimaŝinojn. Mi modifis ilin por aldoni la son-
trakon al la bildoj, kaj samtempe anstataŭigi la intermitan
voĵiron de la filmoj per kontinua, kio ebligis duobligi la
rapidon. Tamen oni per tio ne duonigis la tempon de la ko-
piado (oni gajnis nur 20%), ĉar multe da tempo restis
perdita por rekunruli kaj reŝargi la negativan bendon, de-
ŝargi la bendon, kiu ricevis la pozitivan latentan bildaron
kaj ŝargi novan virgan bendon, reŝargi la lumvariigilon...
Mi ekipis la maŝinojn per aparato jam ekzistanta sed,
mi ne scias kial, neuzita, kiu aŭtomate rekunrulis la nega-
tivan bendon en kontinua procedo, kaj kreis samprincipan
lumvariigilon. Restis nur la necesa manipulado de la virgaj
kaj latentbildaj pozitivaj bendoj. Fine oni gajnis 33% el la
tempo. La laboro antaŭe plenumita en 6 horoj, de tiam
necesigis nur 4 horojn.

Tiel la mastro gajnis monon, sed la laboristinoj perdis
du suplementajn horojn kun plialta salajro. Mi konvinkis
la direktoron de la uzino ("laboratorio") plialtigi ilian hor-
salajron, tiel ke ili ne perdis monon, dum ili gajnis du hor-
ojn da nokta dormado. Pri tio ili estis al mi dankemaj.

En tiu afero nur mi nenion gajnis, nek salajran plialt-
igon nek premion, kvankam mi dediĉis plurajn noktajn hor-
ojn senpage al la pliperfektigo de la enkondukotaj novaĵoj.
Sed tio estis normala : ni inĝenieroj estas pagataj, kun re-
lative altaj salajroj, por plibonigi la teknikon, do ne meri-
tas esceptan rekompencan pro tiaj plibonigoj.

* En la broŝuro "Migrante tra Metioj". (Nun ree disponebla - Red.)

Eĉ, ofte, la mastroj ne konscias pri tiu aspekto de nia
metio. S-ro Charles Pathé diris : "Neniam la inĝenieroj
ion inventis." Sed kion li mem inventis? Eĉ ne la arton
ekspluati la salajrulojn, manlaboristojn kaj teknikistojn,
kiun li heredis de antaŭaj kapitalistaj industriistoj.

Mi pensas ankaŭ pri alia stulte sprita mastro, kiu diris:
"Ekzistas tri rimedoj por finance ruiniĝi : virinoj, kurĉeva-
loj kaj inĝenieroj. La tria ne estas la plej agrabla." Se tiel
estus, oni povas sin demandi, kial tiuj sinjoroj ankoraŭ
dungas inĝenierojn.

Endas akcenti jenan faktan ignoratan de tro multaj in-
ĝenieroj : ke ili estas ekspluatataj salajruloj, samklasaj
kiel la manlaboristoj malgraŭ la hierarkia skalo de la
salajroj, kun samaj interesoj fronte al la ekspluatantaj
mastroj, ĉu individuaj ĉu anonimaj. "Via malamiko, estas
via mastro."

Printempa rememoro

En aprilo 1925, sur la Tuileries-promenejo en Parizo,
la hipokaŝtanarboj, kun siaj helverdaj foliaroj portis alte
siajn blankajn kaj rozajn florgrapolojn.

Ĉe mia flanko marŝis Zaza per sia fleksa paŝado de An-
tilia knabino. La matenaj sunradioj kaj la freŝa venteto
karegis ŝian satenecan bronzkoloran haŭton.

Ŝi milde premis sian brakon al mia, kaj flustris : "Vidu
la blankajn virinojn, kiajn enviajn rigardojn ili ĵetas al
mi!" Kaj post mallonga paŭzo : "Tamen ili estas pli belaj
ol mi..."

Ĉu koketume, por provoki de mi protestan reagon? Ni
kune ekridis. Ŝia rido gaje trilis kiel kanto de birdo el la
Insuloj.

La belega vetero daŭris tutan monaton, dum kiu ni ĉiu-
tage refaris la matenan promenadon.

Dudek jarojn poste, ŝi mortis. Bele maturiĝinta, ŝia bel-
eco ne velkis. Tial en mia maljuneco mi daŭre vidas ŝin
juna kaj bela.

Ho printempo, juneco de la jaro!

Ho juneco, printempo de la vivo!

Ho amo, printempo de la koro!

Nimo, Pentekosto 1990

Du eventoj

La "Feria"

Dum dek plenaj diurnoj la urbo vivis en freneza ritmo. Unue kaj ĉefe taŭroludoj : provencaj, kun kamargaj taŭroj portantaj inter la danĝeraj kornoj kokardon, kiun viglaj junaj viroj lerte elprenas kurante antaŭ la besto ; portugalaĵoj kun rajdantaj toreistoj ; hispanaj kun andaluziaj taŭroj kaj hispanaj, sudamerikaj aŭ francaj matadoroj. En la romia amfiteatro, kiu jam rivalas kun tiuj de Madrido kaj Sevilo, dekmiloj da entuziasmaj spektantoj, ne ĉiam tre kompetentaj, sed vibrantaj, kun ĉeesto de la hispana televido. Buntaj kostumoj, vivaj koloroj, briloj kaj scintiloj en la sunlumo aŭ en la nokto, pentraĵoj, diversaj artaĵoj. Noktaj fajrartaĵoj, muzikoj el nigra Afriko, Andaluzio, Karaiboj, Japanio, dancado, frenezumado de la eks-cititaj knaboj kaj knabinoj, bruado, petardeksplodoj, drinkado. Aliaj spektakloj, kiel boatturniroj sur la kanalo, vetkurado de miloj da infanoj. La urbo kun nemulte pli ol 120 000 loĝantoj akceptis dum tiuj dek tagoj kaj dek noktoj milionon da vizitantoj el tuta Francio, el suda kaj norda Eŭropo, el ambaŭ Amerikoj, el Japanio, ktp, en varmega etoso.

La Santo-Estello

Samtempe okazis la ĉiusepjara festo de la "felibroj". Ĉe la piedo de la Tura Magna, meso provenclingve celebrata de la episkopo mem, folkloro defilado de "gardians" (kamargaj vakeroj) rajdantaj sur siaj blankaj ĉevaloj, kun knabinoj en Arlezanina kostumo sidantaj sur la grupo de la ĉevalo, reprezentantoj de la sep regionaj konservaj instancoj de la ok-lingvo, delegacioj de eksterlandaj latinidaj lingvoj, kataluna, sarda, romanĉa, rumana. Floraj ludoj, elekto de la "reĝino de l' Felibriĝo"*

Tiel, dum preskaŭ du semajnoj, nia mezgranda urbo estis la ĉefloko de Okcitanio, de la taŭrokulto kaj de la junularo.

* La Felibriĝo estas la movado por la pluvivigo de la okcitanaj lingvo, tradicioj kaj kulturoiniciativede Frederi Mistral en 1854 kaj fondita de

Tutmonda kulturo

Lanti : La nacioj devas kunfandiĝi en unu regnon kun unu komuna kulturo.

Jakelino : Ĉiu etna kulturo, per esperanto, alportos sian originalan kontribuon al tutmonda kulturo.

Ĉu kontraŭdiro ?

Lanti ne pretendis, ke la unu komuna kulturo naskiĝos per spontana generado, kiel laŭ la Biblio la ĉielo kaj la tero estis de Dio kreitaj el nenio. La kunfandiĝon de la nacioj en unu regnon akompanos kunfandiĝo de la naciaj kulturoj en unu komunan.

Tiu procezo jam komenciĝis. Jam longe okcidentaj verkistoj inspiriĝis de orientaj fabeloj. Modernaj komponistoj, pentristoj, skulptistoj ĉerpas inspiron el artoj de foraj landoj. En ĉiuj kulturaj nacioj oni pli kaj pli legas en tradukoj librojn de alinaciaj verkistoj. Tiun elvolvadon sendube akcelos ĝeneraligita uzado de lingvo internacia.

Iuj kontraŭuloj al esperanto riproĉas, ke ĝi estas eŭropa lingvo. Tio estas vera, kaj en la komenca periodo ĝi disvastigis nur eŭropan kulturon (inkluzive tiun de Amerikoj, Aŭstralio, Novzelandoj) sed poste, dank'al sia fleksibleco, ĝi ricevis kontribuojn de aliaj kulturoj : ekstremorientaj, ĉina, hinda, irana, mezorientaj, kaj nun afrikaj. Plie, senpere aŭ pere de modernaj naciaj lingvoj, ĝi enkorpiĝis antikvajn kulturojn, kiuj ne mortis kune kun la respektivaj lingvoj. Same, se la lingvo internacia iam fariĝos la unika lingvo de la unuiginta homaro, la nunaj naciaj kaj etnaj kulturoj ne mortus sed kunfandiĝus en la komunan mondkulturon.

la sep "primadié". Por ili la nombro 7 havas ian magian karakteron. Ili adoptis kiel simbolon la seppintan stelon, kaj decidis celebri sian feston ĉiun sepan jaron.

La reĝino de l'Felibriĝo ne estas reĝino de beleco : kvankam ofte bela, ŝi estas elektata laŭ aliaj kriterioj. Ŝi funkcias dum sep jaroj kiel ambasadorino de Okcitanio en Francio kaj en aliaj latinidaj landoj.

La unua reĝino, en 1857, estis "dono" (S-ino) Mistral, la edzino de la granda poeto, unua "capoulié" (majstro kaj ĉefo) de la Felibriĝo.

Junio en Irano

Dekmiloj da mortintoj, centmilo da vunditoj, kaj kiom da domoj detruitaj? La kataklisma tertremo ne domagās tiun malfeliĉan popolon jam frapegitan de la terura milito kun la najbara Irako.

El la tuta mondo impetas urĝemaj teamoj da helpemaj volontuloj. La ŝtataj instancoj, konsciaj pri sia nekapablo fronti al la necesego, post hezito kaj kun kelkaj esceptoj, fine akceptis tiun helpon. Sed komence, pretendante, ke la enlandaj rimedoj sufiĉas, aŭtoritataj voĉoj fierarogante rifuzis venon de kuracistoj, flegistoj ktp. Ili konsentis ricevi nutraĵojn, kondiĉe, ke ili estu strikte konformaj al la irana leĝo. Dume altrangaj klerikoj admonis la popolon dankeme akcepti tiun teruregan plagon de Dio senditan.

Tiel manifestiĝas samtempe sennacieca homa solidaro kaj apartiĝema stultega fanatiko. Ŝajnas, ho ve! ke tiu ĉi estas ankoraŭ tre potenca, kaj regas sur multope obtuzmensa popolo.

La 17-an de junio

Iom antaŭ tagmezo, la telefono sonas : "Ha lo! Raymond Laval? Mi estas Grandière. Survoje al vilaĝo apud Montpeliero, pasante tra Nimo, ni povas viziti vin. Nur kelkajn minutojn, ĉar ni devas urĝi. Indiku al ni la vojon..."

Dek minutojn poste, la porda sonorilo anoncas ilian alvenon. Mi ĝojis vidi Rolandon resaniĝinta post danĝera malsano kaj grava operacio, kaj Lilion ĉiam junaspekta. Ili ĝojis vidi min marŝi en la apartamento kun kaj sen bastono, ordinara, ne lambastono, kvankam mi estas kaj restos lama. Ili ekparolis france pro ĉeesto de mia edzino, sed ŝi petis ilin uzi esperanton, kiun ŝi sufiĉe komprenas por sekvi la konversacion. Novaĵoj pri Levreaud, pri parizregionaj kamaradoj, pri la SAT-Amikara kongreso en Bondy, pri la projekto de granda vortaro franca-esperanta... Rapide pasis tre agrabla duonhoru. Fulmrapida

vizito, sed ege ĝojiga, kiel en lasta vintro, tiu de Denise Castelló kaj Kribo.

Nia SAT-Amikaro estas vere amikaro.

Florako, 9-an de julio

Ĉu mia maljuna difektita okulo jam ne distingas la kolorojn? Matene je la sunleviĝo, mi ne retrovas sur la rokoj de la supra rando de la monto tiun belegan salmrozan koloron, kiu ankoraŭ lastjare min ravis. Tamen ĝi restas fiksita sur fotoj faritaj el mia fenestro de mia nepino Franciska, kaj sur tiuj fotoj mi bone vidas ĝin. Ĉu konkludi, ke ĉi-somere estas ŝanĝo en la atmosfero, kiu modifas la spektron de la matena sunlumo?

Florako tamen rezervis al mi alian plezuron. Alveninte ĵaŭdon 5an de julio, mi troviĝis tiun vesperon en samideana kunveneto, kun sep geesperantistoj venintaj : du de Bordoza, unu el Tulono, du el la regiono de Ĝenovo en Italio, unu devena de la Luar-regiono (Ana) kaj unu japano (Ljo), la du lastaj nun loĝantaj ne tre malproksime, en Ardeŝo, post kelktempa restado en la muelejo de Beauville.

Ĉiuj pasigis semajnon ĉi tie, ĉiumatene ekirante por tuttaga pieda ekskurso, kaj ĉiuvespere revenante al la etapa restadejo por tie tranokti post duhora animado (diapozitivaj, muziko ktp). Ili venis en mian someran hejmon, kaj tie restis dum sufiĉe longa tempo, kiu por mi tre rapide fluis, en vigla babilado sen krokodilado (kvankam ĉiuj bone scias la francan lingvon), en vere internacia, treege simpatia etoso. Bedaŭrinde ili foriros hodiaŭ, kaj mi restos sola esperantisto en nia urbeto.

Feliĉe mi havas en mia ĉi-tiea biblioteko kelkajn esperantajn librojn. Unu el ili, kiun mi posedis jam pli ol 75 jarojn kaj ankoraŭ ne legis, estas la **Rabistoj** de Ŝilero en la majstra traduko de Zamenhof. Terura, treege romantika dramo, tie elvokive transskribita. Vera modelo de stilo, kiel ĉiuj verkoj aŭ tradukoj de la genia aŭtoro de nia lingvo. Mi tamen notis unu germanismon, plurfoje uzitan, nome la esprimo : "lasi ...i", por "igi...i" aŭ

"ordoni ...i", ekzemple : "Vi lasis min voki, moŝto sinjoro?" aŭ: "Mi lasos elŝiri al vi la koron el post la ripoj".

Ĉar en la skriboj de la majstro ŝoviĝis tiaj idiotismoj, ili ne estas blinde imitendaj modeloj. Eĉ pri ili ni devas ĉiam kritike rilati, memorante, ke la lingvo internacia devas esti kiel eble plej logika esprimilo, kaj ne adopti mallogikajn apartaĵojn de niaj naciaj idiomoj.

12an de julio.

Ne! Ne mia okulo estis kulpa. Sep tagojn sinsekve, je la 6a kaj duono, mi vane gvatis la kutiman kolorigon de la dolomitaj rokegoj per la aŭrora lumo. Fine, ĉi-matene, okazis la atendita fenomeno : la efemera, rava nuanco. Mirinda spektaklo, pri kiu mi ne laciĝas. Unu el tiuj naturaj belaĵoj, pri kiuj la kredantoj kutime dankas kaj gloras la "Kreinton".

RULIĜANTAJ DORMEJOJ

Japanoj multe laboras, estas konate. Sed eble ne estas sciata, ke ili mallonge dormas nokte. Gastinte en diversaj hejmoj, mi rimarkis, ke la enlitiga horo - pli ĝuste mi diru "la surmatraciga horo" - ofte preterpasas la nokto-mezon. Laboremaj edzoj, ankaŭ nomataj de mi "labor-sklavoj", tre malfrue revenas hejmen, je la 10a aŭ poste. Oni ne hezitas telefoni al konatoj post la 10a aŭ la 11a. Pro tio, Japanoj emas dormi irante laborejen kaj revenante hejmen. Subteraj trajnoj kaj busoj plenplenas je homoj dormantaj. Eĉ tiuj, kiuj staras, ŝajnas dormi kun fermitaj okuloj. Oni diras, ke pro tiu dormemo Japanoj ofte forgesas eliri el la vagono ĉe sia haltejo kaj eĉ foje vekigis ĉe la lasta stacio de la linio. Dum mia unua restado en Japanio, mi memoras, ke iu virino proksime de mi subite vekigis dum la subtera trajno senmovis ĉe stacio, kun pordoj malfermitaj. Versajne timante, ke la trajno tuj ekiros, ŝi panike kuris kaj trafis perforte vitran fenestron, kiu ŝajnis al ŝi esti la pordo, perdis la okulvitrojn kaj fine sukcesis eliri el la vagono, aspekte nevundite.

(fino sur p.32)

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO de Petro USPENSKO (OUSPENSKY) (resumpecoj)

TRANSFORMADO DE IMPRESOJ (1^a ŝoko konscia)
TRANSFORMADO DE NEGATIVAJ EMOCIOJ (2^a ŝoko konscia)
(el la 8^a ĉapitro)

Kutime la impresoj stompigas ĉar en la enirejo, ili falas en reton de asociigoj establita delonge. Post iom da tempo, je iu aĝo, la homoj jam ne spertas novajn impresojn; ĉi tio okazas ne ĉar la impresoj ne estas novaj, ĉar ĉiumomente ili povas plu-esti tiaj, sed ĉar ili ĉiam "tuŝas" la samajn asociigojn k estigas la samajn reagojn. Do, la homoj vivas nur en siaj asociigoj, kaj ĉi tio faras ke ilia interna (spirita) vivo estas preskaŭ malplena, preskaŭ morta. Se oni deziras konservi la internan junecon, oni devas nutri sin per novaj impresoj, k tio signifas ke oni devas prilabori la impresojn laŭmezure kiam ili eniras k eviti al ili fali en la antikvajn lokojn, kaj por tio, oni devas transformi ilin, dirante al si mem en la oportuna momento, k tiel konsciiigante: "Estas mi kiu spertas ĉi tion!" (1^a ŝoko konscia).

Transformante ankaŭ negativajn emociojn ("Ĉi tiu ne estas mia vera MIO") oni renovigas la impresojn. (2^a ŝoko konscia) La celo, ekzemple, ne reagi negative al de terminita(j) persono(j) donas formon k signifon al la interna vivo. Se oni memoras pri la celo en la momento kiam eniras la impresoj, k agas laŭ tiu celo, oni troviĝas en stato de percepto pri si aŭ MEMORO PRI SI (*) en kiu okazas interna disiĝo inter observanta MIO kaj observata MIO, nome, oni evitas meĥanikan reagon per tiu konscia ago, kaj tiel oni "vidos ion" aŭ komprenos ion laŭ nova maniero. La impresoj dum stato de memoro pri si fariĝas emociaj. Eĉ la plej simpla afero ekestas interesa aŭ bela k spegulas signifon, kiun oni antaŭe ne perceptis.

(*) Vidu "PSIKOTRANSFORMISMO-n" (La 4^a Vojo aŭ Vojo de l'Sagaca Homo) Eld. SAT-Broŝurservo en 1987^a.

La ĉefa malfacilaĵo por akiri la konscion pri si (3^a stato de konscio) estas ke la homoj kredas jam posedi ĝin! En la revado aŭ sendorma sonĝado, nome, en la kutima 2^a stato de konscio, iu homo povas fari ion la tutan tempon, k tamen ne memori pri si (=ne percepti pri si!)

Oni ne povas haltigi la fluon de siaj pensoj, nek povas kontroli sian imagadon, emociojn k atenton; oni vias en subjektiva mondo nevidante la realan mondon, kaj tio, kion oni nomas lucida konscio, estas nura revado, stato de relativa konscio, el kiu necesas "vekigi".

Tial oni devas klopodi ne nomi sin mem Mi ĉiam, k en ĉiuj okazoj, speciale kiam negativa MIO volas esprimi malagrablan emocijon; homo devas memori ke estas du en li; Li mem (MI), k la ALIA (Ekz.: la negativa MIO) kiun li devas venki se li volas atingi ion. La konvencia psikologio scias nenion pri la divido inter Esenco k Personeco.

LA PERSONECO KONSISTAS EL "RULAĴOJ" KAJ "BUFROJ".

La rulaĵoj estas la "gravuroj" aŭ "enregistroj" (ĉio akirita per instruo k eduko); la malsamaj MIOJ. Alivorte: La rulaĵoj estas "aparatoj" registraj de ĉiu centro (intelekta-emocia-fizika) sur kiuj gravuriĝas la impresoj. La ensemblo de impresoj de ĉi tiuj rulaĵoj, similaj al la vaksaj cilindroj fonografaj (aŭ gramofondiskoj; k pli nuntempe: sonbendoj!), konsistigas la materialon de asociigoj de homo.

La bufroj (mildigiloj de kunpuŝigoj) estas aranĝaĵoj kiuj malpermesas al la homo vidi en si mem la kontraŭdirojn.

Por kreskigi la Esencon (internan disvolviĝon!) oni devas malfortigi la bufrojn. Tiu cele la Personeco devas fariĝi pasiva k la Esenco, aktiva! K por tio necesas la daŭra laboro psikologia pri si, surbaze de la novaj ideoj provizataj en la transforma psikologio.

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

RULIĜANTAJ DORMEJOJ (fino)

Evidente, tiu senviva etoso havas komunikigeblan efikon. Kvankam mi dum jaroj kutimas legi dum veturado, mi lastatempe regule falis en la sonĝan planedon, lulite de la voĉlaŭtigilo kaj aliaj vagonaj bruoj. 90.07.14. R.A.C.



Nun vesperetas. Mi sidas ĉe tablo, en la korto, sub sunombrelo - tute senutila je tiu horo, ĉar la suno malaperantas je la alia flanko. Paciga horo, kiam la kamparano ĉesas labori, kiam la birdoj nur senkonvinke kantetas (por malpravigi min, iu koko laŭte ekkokerikas, sed mi supozas, ke ĝi estas ebria).

La vespermango estas finita. La vespoj lekas fruktosukon sur la glasoj, antaŭ ol la virinoj forprenos ilin (la glasojn) por la purigado.

Infanoj kuras en la korto. Viroj grave pridiskutas gravajn temojn, kiujn ili kutime bezonas pritrakti kiam venas tempo por purigi la teleraron. Ĉio kvietas... pacas... trankvilas...

La muelejo multe ŝanĝiĝis dum du jaroj: iuj konstruaĵoj estis detruitaj, aliaj estis faritaj - almenaŭ preskaŭ, ĉar la lasta malhavas parton de la tegmento...

Granda salono, en kiu oni povas kunveni, gvidi kursojn, eldoni broŝurojn kaj eĉ danci. Nun ĝi havas novan brilan luksan kahelaron (Mi ĵus demandis pri la vorto, temas pri la fajencaĵoj per kiuj oni kovras la plankon. NDLA.)

La parko... Ĝi multe transformiĝis: anstataŭ la antaŭa ĝangalo nun estas traireblaj aleoj, grandega herbejo kaj... la kanalo.

Ĉar la Seŭno estas tute senakva, Gastono profitas de la okazo por bori kanalon en la fundo de la rivero: anstataŭ la serpenta, malregula rivereto kun truoj kaj sabl-

amasoj ĉe la flankoj, ĝi estas nun bela, rekta, glata kanalo. Ĝi progresas je dek metroj ĉiutage. Laŭ miaj kalkuloj ĝi atingos Bialistokon okaze de la jarmila kongreso, kie iu proponos anstataŭigi la lingvon per telepatio, konservante nur la ĉapelitajn literojn.

Nun la suno malpli sunas. Mi aŭdas la anserojn anserbleki de iu nedifinita loko, kaj ekvidas Sabrina-n, kiu ludas per la ŝtonoj de la korto. Sabrina estas ĉarma, blonda, kvarjara (kaj duono! - ŝi precizigas) knabino, denaske esperantista, kiu infane babilas en lingvo bedaŭrinde aŭdata plejofte ĉe maljunuloj... La vortoj tute spontane spruĉas el ŝia buŝo kun infaneca ĉarmo. Ŝi alportas al mi, "ja miejon" (komprenu "la mielon", mankas al ŝi la antaŭaj dentoj) por mia tizano, kaj ridetas al mi. Ŝi zorge riproĉetas sian dujaran fratinton, Mevina, kiu marŝas en la tizanpleto. Kuloj profitas de tio por piki miajn piedojn. Griloj faras sian faman grilan bruon, kiu simbolas por la francoj la sudan parton de ilia lando.

La suno malaperas. Same faras Gastono.

Baldaŭ estas la deka. La horo por Solanĝa gluti sian kuracilon - miraklaĵo, asertis la kuracisto, kiu tamen skribaĉis tute nelegeblan preskribon, kiun la apotekistino afable tradukis kaj transskribis sur la skatoloj, sed bedaŭrinde ne pli legeble ol faris la kuracisto mem. Tamen, estis en la skatolo de la kuracilo papero, kiu konsilas fari ekzakte kiel indikas la kuracisto : granda paŝo antaŭen!

Do, dank'al retelefonado por pliaj klarigoj, ni sukcesis ne glutigi al Solanĝa la tutan skatolon la unuan tagon!

Eknoktas, eklunas. La gepatroj enlitigas la infanojn, kiuj ekscite ridas pli laŭte kaj pli nervoze, ĉar ili scias, ke baldaŭ la ludoj finiĝos kaj volas daŭrigi plejeble la plezuron... Ili saltas de la ŝtuparo en la brakojn de Marcelo. "Kun mia piedo ankaŭ" krias Sabrina! Kaj ŝia patro flugigas ŝin cirkle kvazaŭ aviadilon...

Lulu veturigas en ĉarumo tegmentita per dratreto, la anserojn, kiuj perdiĝis sur la ŝoseo. "Buso de anseroj!" anoncas Kribo, kiu, kvankam en libertempo, ne forgesis kiel staciestri. Feliĉe li ne fajfas, kaj la anseroj iras dormi trankvile, baldaŭ imitataj de la muelejanoj...

IOM PRI LITERATURO

NE PLU INFANO?

lige kun publikigo de romano "Ni"
de Jevgenij Zamjatin en Sovetio

Al racie pensanta k-do Deker,
mia sola leganto

"Mi timas" - tiel en 1921 Jevgenij (Eŭgeno) Zamjatin titolis sian malgajan meditadon pri antaŭsentata sorto de l' rusa literaturo.

"Mi timas - skribis li, - ke veran literaturon ni ne havos ĝis oni ne ĉesos konsideri la rusan popolon infano, kies virgecon necesas gardi. Mi timas, ke veran literaturon ni ne havos ĝis ni ne kuraciĝos de iu nova katolikismo, kiu ne malpli ol la malnova timas ĉiun herezan vorton. Kaj se ĉi tiu malsano estas nekuracebla - mi timas, ke la rusa literaturo havas unusolan estontecon : sian pasintecon."*

La verkisto timis, ĉar estis kialoj por timi. La "nova katolikismo" malpermesis ankaŭ liajn verkojn kaj forstrekis lian nomon el la historio de l'rusa literaturo. Apenaŭ kredeblas : preskaŭ 70 jarojn estis malpermesita en Sovetio romano de Zamjatin "Ni"! Verkita en 1920, baldaŭ tradukita en multajn lingvojn (angla - 1924, ĉeĥa - 1927, franca - 1929, ktp) ĝi estas bone konata ekster Sovetio kaj ĉiuj specialistoj pri "antiutopiaj verkoj" nepre riverencas al Zamjatin kiel antaŭulo de Orwell. Nur Glasnosto de Gorbaĉov liberigis el prisilentado ankaŭ ĉi tiun romanon: revuo "Znamja" ("Standardo") publikigis ĝin.

Kio okazas? Ŝajnas ke la nunaj sovetiaj oficialuloj ĉesas konsideri la propran popolon infano, pri kies "morala sano" ili tiom senlace zorgis. Nun ankaŭ simpla sovetiano povas konatiĝi kun l' antiutopio de Zamjatin kaj... rekoni bone konatan vivon! Riĉa fantazio de l' verkisto (aŭ pli ĝuste - lia fenomeno antaŭsento) kreis Unuecan Ŝtaton,

kies civitanoj - "numeroj" - vivas en matematike organizita, centprocente feliĉa socio. Memkompreneble, ke feliĉa socio nature emas feliĉigi ankaŭ siajn najbarojn. Por tiu celo la "numeroj" konstruas kosman ŝipon "Integral", ja necesas:

"... subigi al bonfara jugo de racio nekonatajn estaĵojn, loĝantajn sur aliaj planedoj - povas esti ankoraŭ en sovaĝa stato de libero. Se ili ne komprenos, ke ni portas al ili matematike-seneraran feliĉon, nia devo estas devigi ilin esti feliĉaj. Sed antaŭ ol uzi armilojn, ni elprovas vortojn."

(Ĉu ne la saman celon havas stalinistoj, kiam ili parolas pri "internacia devo"? Gvidataj de "internacia devo" ili invadis Hungarion en 1956, Ĉeĥoslovakion en 1968, Afganion en 1979...)

En 1929-1930 povoplenaj sovetiaj kritikistoj kondamnis la romanon: "Kalumnio pri sovetia soci-ordo". Eksetis freneza persekutado de l'aŭtoro. Li turnis sin rekte al la "Bonfaranto". "Letero de Zamjatin al Stalin" (1931) aperis en revuo "Knijnoje obozrenije" (n-ro 15, 1988). En sia letero Zamjatin petis permeson forveturi eksterlanden por ripozo:

"... mi ne volas kaŝi, ke la ĉefa kialo de mia peto pri permeso al mi kaj mia edzino forveturi eksterlanden estas mia verkista senelira stato, la morto-verdikto, deklarita al mi kiel verkisto ĉi tie."

Zamjatin havis ŝancon: venis la permeso. Li restis en Okcidento kaj mortis en Parizo en 1937.

Kio tiom frenezis ortodoksajn sovetiistojn? Nu, legu mem:

"Morgaŭ ni ekvidos la saman, de jaro al jaro ripetigantan sed ĉiufoje aliel ekscitigan vidindaĵon: potencan bokalon de unuanimeco, benoplene levitajn manojn. Morgaŭ - tago de l'ĉiujara elekto de l'Bonfaranto. Morgaŭ ni denove enmanigos al la Bonfaranto la ŝlosilojn de l'neŝancebla fundamento de nia feliĉo. Kompreneble, tio tute ne similas la senordajn, neorganizitajn balotojn de prauloj, kiam - ridinde diri - oni eĉ ne sciis anticipi la rezulton. Konstrui

ŝtaton sur absolute nekalkuleblaj hazardoj, blinde - kio povas esti pli senseca?"

aŭ:

"... kiel tio povis okazi, ke la prauloj tute ne vidis, kia senseca estis ilia literaturo kaj poezio? La mirinde potenca forto de l'arta vorto eluziĝis tute vane. Ridinde eĉ: ĉiu skribis kio en la kapon venis."

aŭ:

"... Eĉ ĉe prauloj - la plej maturaj sciis: rajtoj fontas el forto, rajto estas funkcio de forto. Kaj jen - du pesilteleroj: sur unu - gramo, sur la alia - tuno, sur unu "mi", sur la alia "Ni", Unueca Ŝtato. Ĉu ne klaras do: imagi ke "mi" povas havi iajn "rajtojn" rilate al la Ŝtato kaj imagi, ke gramo povas sampezi kun tuno - estas la samo. El tio venas disdono: al tuno - rajtojn, al gramo - devojn. Jen la natura vojo de sensignifeco al grandeco: forgesi, ke vi estas gramo kaj senti vin milionero de tuno..."

En ideala matematike-senerara feliĉa mondo ĉio estas klara: "La vero estas unusola, kaj vera vojo estas unusola; tiu ĉi vero estas - duoble du, kaj tiu ĉi vera vojo estas kvar." La "numeroj" ne pensas: pri ili zorgas l'Unueca Ŝtato kun la Bonfaranto ĉekape.

Ordinara sovetiano de l'80-aj jaroj, al kiu oni dum jardekoj enkapigadis, ke ekzistas "unusola vera teorio" (marksismo-leninismo-stalinismo, la tria komponento ne plu post 1956), unusola "vera vojo al socialismo" (tiu de Sovetio mem) - kiel li akceptos publikigon de l'romano? Diskutadoj ne mankos.

Ĉu ne plu infanas - la "rusia demoso"?

Dume klaras nur jeno: post lastatempaj rehonorigoj kaj publikigoj necesas komplete reverki la historion de la rusa postrevolucia literaturo. Kaj certe - ankaŭ de aliaj popoloj de l'Unueca Ŝtato... pardonu! Sovetio.

Oksana

* Zamjatin uzas grekan vorton "demos" anstataŭ la rusa

"narod" - eble, por memorigi la etimologion de "Demokratio"? Ankaŭ ne pri "rusa demoso" temas, sed pri "rusia", t.e. la tuta loĝantaro de l'Rusia soveta federacia socialisma respubliko. Sovetio (USSR) en 1921 ankoraŭ ne ekzistis.

Novaĵo el Japanio!

KIEL JAPANOJ HODIAŬ PROTEKTAS JAPANAN IMPERIISMON

Sep milionojn da enoj (70 000 germanaj markoj) elspezis prefektejo de NAGASAKI por protekti imperian paron kontraŭ realaĵoj de la vivo, t.e. kontraŭ fetoro el granda porkbredejo (3100 porkoj), troviĝanta proksime de arbareto en kiu Akihito ceremonie plantis arbon meze de arbo.

Tiu ĉi alta sumo estos la prezo de parfumita segaĵo, kiun oni disŝutis en la stalojn antaŭ la alveno de la "diido".

Plano estis okazigi la ceremonion en loko kiu estu sufiĉe for de la civilizacio kaj poste sekrete transplanti la arbon en la fetoran arbareton; tiu ĉi plano estis finfine forlasita. Ĉiaokaze la porkbredejo estis protekta de la imperiaj okuloj per grandega verda kurteno.


Alttensian linion, kiu malbeligas la ĉirkaŭan pejzaĝon oni unue eĉ intencis "transplanti", sed pro la tro altaj kostoj (185 milionoj da enoj) oni rezignis pri tio kaj anstataŭigis 3 fostojn per 3 aliaj, pli belformaj kaj verdaj.

Aŭdinte tiun ĉi novaĵo, kiu ĝojas? Kiom da postvivantaj viktimoj de la atombombo, kiuj ankoraŭ vivas kaj daŭre suferas pro atommalsanoj aŭ pro la timo, ke ili subite ekmalsaniĝus!

Foje iu envie skribis pri la hodiaŭa japania prospero sub la japania konstitucio. Sed fakte, kia prospero!

Aliflanke la armea buĝeto hodiaŭ estas la 3a en la mondo, kvankam Japanio hazarde ne havas atomarmilaron.

verdaj gelupoj



E1 "APOTEOZO DE SENGRUNDECO"

(Provo de sendogma pensado)

34

Moralaj homoj estas la plej venĝemaj homoj, kaj sian moralecon ili uzas kiel la plej bonan kaj rafinitan venĝilon. Ili ne kontentiĝas per nura malestimo kaj mallaŭdo de siaj proksimuloj, ili deziras ke ilia kondamno iĝu ĉiesa kaj deviga, t.e. ke kune kun ili ĉiuj homoj staru kontraŭ kondamnito, ke **eĉ propra konscienco de kondamnito estu iliaflanke**. Nur tiam ili sentas sin tute kontentaj kaj trankviliĝas. Krom moraleco, nenio alia en la mondo povas atingi tiom brilajn rezultojn.

35

Persisto en malbono. Herezuloj ofte estis persekutataj pro etegaj deflankiĝoj for de reganta kredo. Ĝuste ilia persisto pri bagateloj plej incitis. "Kial ili ne konsentas pri tiom eta cedo? Seriozajn kialojn ili ne povas havi. Ili nur volas malĝojigi nin, fari al ni malbonon." Iom post iom malamikeco kresĉendis, kaj aperis brulŝtiparoj kaj torturoj, ĉiuj kontraŭ persistado en malbono...

37

La plej gravaj kaj signifaj pensoj, revelacioj, venas en la mondon nudaj, sen vorta ŝelo: trovi por ili vortojn estas aparta, malfacilega tasko, eĉ arto. Kaj kontraŭe: stultaĵoj kaj banalaĵoj venas jam vestitaj en buntaj, eĉ se malnovaj, ĉifonoj - tiel, ke eblas ilin tuj, sen peno, prezenti al publiko.

46

En "Portreto" de Gogol pentristo falas en senesperigon pro la penso, ke li oferis sian arton por "vivo". Ĉe Ibsen en lia dramo "Kiam ni, mortintoj, vekiga" ankaŭ pentristo, glora tra la tuta mondo, pentas pri tio, ke li oferis sian vivon - por arto. Kaj nun elektu, kiaspeca pento al vi pli plaĉas.

Filozofoj laŭdas kiel la plej altan kaj indan celon de nia ekzisto la animtrankvilon, aequanimitas. Sed, tiukaze, nia idealo devas esti bestoj, kiuj rilate animtrankvilon estas perfektaj. Rigardu ŝafon aŭ bovinon en paŝtejo. Pri pasinto ili ne rememoras, estonton ne divenas, sed plene vivas en nuno, kiu, se paŝtejo bonas, tute kontentigas ilin.

Stranga kontraŭdiro : ni vidas kiel ĉirkaŭ ni pereas miloj da homaj estaĵoj, kaj tamen ni daŭre atente paŝas por ne surtreti vermon! Sento de kompato vivas en ni. Ĝi ne povas savi ĉiujn - kaj tial, antaŭ vizaĝo de vivhororo, ĝi silentas. Ĝi povas helpi nur iun - kaj eligas foje terurajn kriojn pro iu eta maljustaĵo. Sed Schopenhauer volis fari el kompato metafizikan bazon de moralo. (El la unua ĉapitro)

Ĝeneralaj reguloj. Homoj turnas sin al filozofoj por ĝeneralaj principoj. Ĉar ankaŭ filozofoj estas homoj kaj konformigas sian produktadon al merkatbezonoj, ili plejparte okupiĝas pri preparo de ĝeneralaj reguloj. Sed ja aperas demando: kiun sencon havas ĝeneralaj reguloj? Preskaŭ samtempe kun la demando venas respondo: nenian. Naturo imperative postulas de ĉiu el ni individuan kreadon. Homoj ne volas tion kompreni kaj daŭre atendas de filozofio la lastajn verojn, kiuj ne estis, ne estas kaj ne estos. Estas tiom da veroj, kiom da homoj en la mondo. Kaj kial, finfine, ĉiu matura homo ne estu kreanto, ne vivu proprariske, ne havu propran sperton? Infanojn, neplenkreskulojn, eĉ junulojn oni povas varti, instrui. Sed plenkreskulojn, kiuj serĉas montrilojn, necesas ĉiamaniere brulmarki, mallaŭdi. En ili parolas pigro kaj timo. Ili timas provi kaj tial ĉiam iradas konsulti saĝulojn. Saĝuloj senhezite prenas sur sin respondecon por vivo de aliuloj. Ili elpensas ĝeneralajn regulojn, kvazaŭ al ili vere malfermitas fontoj de konoj, fermitaj por ordinaraj mortontoj. Vane! Saĝuloj scias ne pli ol malsaĝ-

uloj - ili havas nur pli da kuraĝo kaj memcerteco. Ĉiu saĝa homo tutanime ridas pri "libraj" vidpunktoj. Sed librojn verkis ja saĝuloj. Kaj efektive ili ofte estas ege interesaj - sed ĝuste tial, ke ili ne enhavas en si ĝeneralajn regulojn. Malfeliĉulo estas tiu, kiu decidas fari sian vivon laŭ Schopenhauer, Hegel, Tolstoj, Schiller aŭ Dostojevskij! Ilin eblas kaj eĉ endas legi - sed vivi necesas proprasaĝe. Tion plej bone scias tiuj, kiuj faris eksperimentojn - t.e. provis vivi konforme al tiu aŭ alia ellegita teorio. En pli bona kazo rezultis banaleco. Do, eliro ne estas! Ĉu volas tion homo aŭ ne, frue aŭ malfrue, li devos agnoski maltaŭgon de ĉiaspecaj ŝablonoj kaj komenci krei mem. Kaj ĉu, après tout, tio estas tiom terura? Mankas ĝenerale devigaj opinioj - do ni elturnigu per nedevigaj. Suferos pro tio suferos nur instruistoj...

Elrusigis : Oksana

"LA FLORO DE L'NOKTO"

de irana poeto : **N. Nader-pur**
Tradukis elperse : Djavad Kamali
IRANO



*Kiam la lumo de l'luno
ekbrilis,
kiam la floro de l'stelo
kreskis,
kiam la brizo de l'salaj maroj
blankajn ŝaŭmojn de la akvoj
flaris;*

*Tiam vi sole revenas, sed nuda
certe parfumita
de laodoro de multaj floroj.*

Mi brakumas
vian mildan korpon,
kiel lito de l'nubo, la sunon.

Vi ekridas
kaj al mi kokete diras :
- Kiam ni, do, ambaŭ
pluki ĉi-stelojn povas?

Mi tuj rigardas
al senbrua ĉielo
kaj vi rigardas
mire al miaj okuloj.
Miaj palpebroj malleviĝas,
kiel viaj,
kiel flugiloj de du birdoj
en pluvaj noktoj.

Vi poste ridas
kaj remalfermas
viajn belajn lipetojn.
Kun vi vento ekĝemas sopire :
- Kiel estas silente jam ĉi-nokte!

Bruliĝas subite de kisadoj
viaj dolĉaj lipetoj,
kiel la floro de la vespa pikilo.
Ni sentas ambaŭ en niaj buŝoj
vinberan guston de l'pikaj kisoj.

Denove ekruĝiĝas
viaj mildaj lipetoj;
refoje ekfermiĝas
viaj fajraj okuloj
de l'bonĝuaj kisetoj.
Vi ridas kaj min diras deloge :
- Kiel estas silente jam ĉi-nokte!

Ce la aŭror'
kiam anasoj flugas al ĉielo
por kapti la luman stelon, de for,
sur lito de lunlumaj sabletoj,
ili vidas nur unu
du kune tiujn ombrojn.
(ambaŭ du tiujn ombrojn!)

LA MONDO DE DIOJ kaj LA KREADO DE LA MONDO

En Togolando, ĉiu gento havas propran legendon pri la kreado de la mondo kaj pri la Dioj. Tamen ia unueco vidigas en tiu diverseco. Tiel en la suda parto de la lando, la komuna bazo de la legendoj pri la kreado de la mondo jenas:

En la komenco, neniu estis krom Maŭ (Maŭ signifas tiun, kiun neniu povas superi, la plej potencon). El kalabaso (speco de kukurbo, kies ŝelon oni uzas kiel ujojn) Maŭ kreis la mondon. La kovrilo de la kalabaso estas la ĉielo, kaj la cetera parto, la tero. Maŭ vivis en tiu mondo longtempe, antaŭ ol decidi pri la kreo de la homoj, bestoj, ktp. Antaŭ ol la homojn Maŭ kreis SEGBO LISSA kaj NANA BUKURU, kiuj estas Maŭvioj (idoj de Maŭ). La tuta laboro de la kreado okazis tri tagojn, kaj Maŭ ripozis dum la kvara. Tial, dum la lasta tago de la semajno, la kvara, nomita KLEGBE (Ripoza tago), neniu rajtas labori.

Maŭ tiam vivis sur la tero kune kun siaj kreitoj. Tiel li povis akcepti ilin kaj kontentigi iliajn petojn. La ĉielo estis en la komenco tiom proksima de la tero, ke homoj ĉiam volis ĉion ajn fari per kaj el ĝi; kelkaj homoj eĉ prenis ofte da ĝi por viŝi la anuson post fekado. Ankaŭ pistiloj tuŝis kaj difektis ĝin, kiam virinoj pistis. Maŭ iel ofendiĝis pro tiu fuŝemo de la homoj; tial, Li malproksimigis la ĉielon, por ke ĝin ne trafu plu tiaj sortoj. La homoj devis koleriĝi. Ili petis de Maŭ, ke Li revenigu la ĉielon. Maŭ ne povis kontentigi tiun peton kaj aliajn pli strangajn de la homoj faritajn. Tiam la homoj komplotis por mortigi Maŭ. SEGBO LISSA kaj NANA BURUKU aŭdis pri tiu konspiro kaj decidis ĉion raportis al Maŭ. En sonĝo Maŭ mem informiĝis pri tiu malbona intenco de la homoj. Tial, dum la sekva mateno de la sonĝa nokto, frue, antaŭ ol Segbo kaj Nana atingis Maŭ por raportis, Li jam pretigis sian bagaĝon por fuĝi ĉielen. Maŭ tiam konfidis al Lissa kaj Nana la gvidadon de la tero kaj malpermesis al ili seksumi.

Kiam Maŭ jam estis for, la viro Lissa estis logita de la virino Nana, kaj okazis, kio ne devus okazi. Maŭ koleriĝis kaj punis ilin, forprenante de ili la lingvon, kiun ili parolis kun la homoj. De tiu geiĝo naskiĝis ĝemeloj **HEBIESO** kaj **SAKPATE**. Kreskinte, ĉiu el la ĝemeloj deziris regi super la alia. Tiam okazis granda kverelo, kiu igis Hebieson migri al la ĉielo. Maŭ ne povis lin akcepti ĉe si, tial li faris al li domon super la nuboj. Tie vivis Hebieso ĝis la naskiĝo de sia frato **DAN**. Estinte sufiĉe aĝa, **DAN** vagadis inter la loĝejo de Hebieso kaj tiu de **SAKPATE**. Irante al Hebieso, Dan ĉiam mensoge rakontis al li kalumniojn de Sakpate pri Hebieso. Por montri al Sakpate sian koleron, Hebieso pluvigis kaj muĝegis. Tiuj muĝoj kaj pluvoj maltrankviligis Sakpate, kiu kredis la homojn farantoj de tiuj katastrofoj. Tiam Sakpate mal-sanigis la homojn per variolo. Tiu situacio tre longe daŭris, kaj la homoj amase mortis. Unuflanke Dan, Hebieso kaj Sakpate, kaj aliflanke la homoj ne komprenis unuj la aliajn. Kiel do povus la homoj plendi al Sakpate kaj al Hebieso? Tiu stato de la homoj iel vekis kompaton en la ĝemeloj, Dan ĉiam dronis en ĝojego. Sakpate ekpensis, ke, verŝajne la homoj ne kulpas pri tiuj misfaroj, kaj siaflanke Hebieso tute ne komprenis la jubilon de Dan. Ĉu nun Hebieso kaj Sakpate povus interkonsenti por plibonigi la sorton de la homoj? Kiu el ambaŭ farus la unuan paŝon? Ĉu ne tiu estus malsuper la alia? Tiu kompatosento neniel mildigis la konflikton inter Sakpate kaj Hebieso ĝis la naskado de la filo **AFAN** de **LISSA** kaj **BURUKU**.

Afan virge naskiĝis (sen sekskuniĝo de Segbo kaj Nana). Maŭ sendis **AFAN** por savi la homojn kaj repacigi la ĝemelojn. Li komprenis ambaŭ lingvojn, tiun de siaj gepatroj kaj tiun de la homoj. Tiel, li sukcesis montri

- al Sakpate, ke la homoj neniel kulpas pri tiuj fulmotondroj,
- al la homoj, ke, aŭdinte perfidojn de Dan pri Sakpate, Hebieso muĝis kaj pluvigis; tiuj fulmotondroj tre kolerigis Sakpate, kiu, ekpensante la homojn farantoj de la katastrofoj, pluvigis variolon.

Tiel **AFAN** sukcesis repacigi la ĝemelojn kaj savi la homojn. Hebieso ĉiam restas super la nuboj, kaj Sakpate sur la tero, ambaŭ havas unu kun la alia eĉ amikajn rilatojn. Hebieso fariĝis dio de la fulmotondro, kaj Sakpate, dio de la tero. Dan povis vivi nek kun Hebieso, nek kun Sakpate, nek kun la homoj. Tial li fuĝis en arbaron. Kelkiam li fuĝas direkte al la ĉielo pro persekuto de Sakpate. Ne povante trafi Hebieson, li restas inter la tero kaj la nuboj en la formo de ĉielarko.

GBEGLO Koffi

NI FILOZOFU...

Mi emas al la filozofio. Mi emas, laŭ miaj povoj kaj scikonoj vidi, kio kaŝiĝas malantaŭ tio, kio vidiĝas supre, serĉi la veron, almenaŭ mian veron, inter tiom da mensogoj, kiuj bombardas nin. Radio, kino, televizio, gazetaro, propagando; aldona, politikistoj kaj religiuloj.

Ni do filozofu...

La tri pli disvastigitaj religimovadoj - kiujn mi mencias kronologie - estas jenaj :

- 1) Budhismo.
- 2) Kristanismo, kiu estas branĉo de judismo.
- 3) Islamismo.

Ĉiu el ili, en sia sfero, ŝanĝis la homan vivon kaj ĝia influo plu daŭras tra la jarcentoj. Ili vidis malaperi imperiojn, kiuj ŝajnis eternaj.

Ĝis nun la bazo de nia civilizo estas religia. Niaj nomoj, la geografiaj nomoj, la ĉefaj festotagoj, kiujn ni festas, la almanako, kiun ni uzas, la geedziĝaj kaj funebraj ceremonioj k.c. estas verko de religiuloj. Tio inter kristanoj (branĉo de judismo) same kiel inter budhanoj kaj islamanoj.

Tamen, proksime de ni ekzistis tri homoj, kiuj estis nek sanktuloj nek mistikuloj, kiuj influis kaj eĉ ŝanĝis la homan historion. Multaj aferoj okazas niaepoke (lastaj jaroj de la 20-a jarcento post Kristo) kaŭze de tio, kion ili proklamis aŭ faris. Jen iliaj nomoj kiel ili aperis en la mondo :

1) Karlo Marks (1818-1883) aŭtoro de **La Kapitalo**, baza libro de komunismo.

2) Sigmundo Freud (1856-1939). Li okazigis revolucion en psikologio kaj psikiatrio. Liaj ideoj influis kaj influas grandskale la tutan homan kulturon.

3) Vladimir Ilitch Ulianov (1870-1924), alnomata Lenin, revoluciestro, kiu, unuafoje en la homa historio, aboliciis la privatan proprajon (eks-Rusio).

Ankaŭ proksimaj al ni estas aliaj eventoj gravegaj, memorindaj; sed laŭ filozofia starpunkto (en mia opinio) ne havas la signifon de tiuj, kiujn plenumis la tri homoj supre menciitaj.

Bonvolu, do, legi :

1) Eltrovo de la penicilino fare de Aleksandro Fleming (1882-1955), bazo de ĉiuj antibiotikoj, kiuj savis kaj savas multajn vivojn.

2) La atomenergio.

3) Rekreado de la Israela Ŝtato (jaro 1948-a) post preskaŭ 1900 jaroj de ĝia disfalo (jaro 70-a).

4) Alveno de la unua homo al la luno (jaro 1969-a).

(Aldone kaj interparenteze : Se iam la lingvo Esperanto estos mondscale akceptita kiel helpa lingvo, la nomo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (1856-1917) devos levigi inter tiuj de Marks, Freud kaj Lenin).

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

A. Lopez Luna

Anekdoto de **GASTONO** :

En vagono (ĉe longdistanca linio)


Katolika pastro vojaĝas vid-al-vide kun rabeno. Tagmeze li tranĉas parton de ŝinko kaj proponas ĝin al la rabeno, kiu diras: "Dankon, sed mia religio malpermesas tion al mi!"

- "Vi malpravas, ĉar estas vere bonege!"

Kiam ili disiĝas sur la kajo, la rabeno diras : "Ĝis revido, kaj salutu bone vian edzinon!"

- "Mi ne havas edzinon, mia religio malpermesas tion al mi!"

- "Domaĝe, vi malpravas, ĉar estas vere bonege!"



RECENZE - KRITIKE

(sekvo de L! 88, p.16/18)

Ree pri ĉapitroj 4 kaj 30 (esperantigo de propraj nomoj).

En Sennacieca Revuo 1952, artikolo citita de Ergoto de Bonaero, mi diris, ke la propraj nomoj, ĉar ili estas substantivoj, devas finiĝi per **o**. 38 jarojn poste, mia koncepto tiurilate iom evoluis. Koncerne familinomojn, mi nun opinias, ke oni povas elidi la finan **o**, kaj diri : Zamenhof(o), Lanti(o) (ne Lante!), Bartelmes(o), Varingjen(o) aŭ Varengjen(o), ktp. Koncerne "Lanti", E.de B. argumentas, ke "lanti" nenion signifas en esperanto, sed ankaŭ "Zamenhof" nenion signifas en esperanto, kaj ĉiu rajtas elekti por si sensignifan pseŭdonomon. (Cetere, Eŭgeno Adam ne mem elektis ĝin, sed ricevis ĝin de la parizaj kamaradoj : L'anti = la (ĉiama) kontraŭulo.

C. 31. Ergoto de Bonaero estas kristana kredanto, tio estas lia rajto. Li pretendas akordigi la religian dogmismon kun la SAT-antidogmismo, distingante du ordojn de aferoj je diferencaj niveloj : sube la materiaj aferoj, je nivelo de la fizika mondo videbla, kapteblaj per la sensoj, alireblaj per la intelekto (racio, cerbo); kaj supre, sur ia ĉiela plejalto, la spiritaj (?), la nevidebla mondo, la nemateria mondo, al kiu oni aliras per la emocio (sento, koro, intuicio), kiu konsistigas la rezervitan teritorion de la religio. Ĉar tiuj du ordoj de aferoj ne estas intermikseblaj, ili povas trankvile kunekzisti. Tute simple!

Mi konfesas, ke al ni nekredantoj mankas la ŝlosilo por eniri en tiun nevideblan, nesenseblan, nekomprenoblan mondon, en kiu la kredantoj kiel nia amiko facile flirts kaj ŝvebas.

33. Ergoto de Bonaero fakte konsentas kun Jakelino, ke paradizo kaj infero ne objektivaj ekzistas, ĉar laŭ li ili montras nur spiritajn animstatojn. Tion jam diris Omar Kajjam en trafa verso de siaj robajatoj: "La ĉielo kaj la infero estas en ĉi" (E.de B. diras: estas interne de ni mem.) Tute konsente! Same pri lia difino de la purgatorio, kiun oni devas trairi por eliri el la infero kaj eniri en la ĉielon.

Por tia koncepto tute ne necesas transcenda, religia spirito. Dio estas la komenca forto, ktp...

34. Lanti legis la Bibliion kaj nenion komprenis. Evidente: ĝi estas "sekreta". Per tia aserto oni povas ĉion klarigi kaj ĉion pravigi. Komprenibile Ergoto de Bonaero posedas la ŝlosilon por deĉifri tiujn sekretojn.

Ankaŭ mi legis la Bibliion (en franca lingvo kaj en esperanto), kolekton da "sanktaj" skriboj verkita de homoj. Ja ĉiuj profetoj, de Moseo ĝis Mahometo, pretendis, ke ili skribis sub diktado aŭ inspiro de Dio, sed pri tio mi rajtas dubi. Kaj, ĉar ili estis skribitaj de homoj, mi pretendas, ke ĉiu homo rajtas kritike analizi tiujn tekstojn helpe de sia racio. Kion mi trovis en tiu amaso da tekstoj?

1. Historiajn faktojn, eble pli-malpli verajn, kun multaj militoj kaj masakroj, en kiu la hebrea gento, la elektita popolo, ne estis pli milda ol la ceteraj.

2. Belajn fabelojn kaj legendojn, el kiuj, samkiel el la diversaj antikvaj mitologioj, la okcidentaj literaturoj ĉerpis fekundajn inspirojn.

3. Belegan poezion en la Psalmoj kaj en la Alta Kanto de Salomono.

4. Sentencojn kaj leĝojn - leĝojn tiel arbitrajn kaj maljustajn kiel ĉiuj leĝoj faritaj de homoj.

Eble vi diros al mi: Vi parolas pri la Malnova Testamento, sed kio pri la Nova?

La Evangelioj estas rakontoj evidente aranĝitaj de disĉiploj, kiuj penis montradi, ke Jesuo estis la Kristo kaj la unika filo de Dio (kion li mem probable neniam pretendis), kun belaj paroloj kaj sensaciaj mirakloj, kaj la granda miraklo de la releviĝo tri tagojn post la morto, sekvita de la Ĉieliro. Plus la Agoj de la Apostoloj, la Epistoloj, kiuj daŭrigas la falsaĵojn kaj absurdaĵojn, kaj la Apokalipso, kies simboloj estas ĝenerale malfacile interpreteblaj.

Jen estas ĉio, kion mi trovis en la Libro. Sendube tio estas multo, sed ke ĝi enhavas la veron, permesu al mi dubi.

38. Ĉu la homoj kreis Dion?

En tiu ĉapitro, kion ni trovas? Nur senbazajn asertojn: "la sola kreanto estas Dio. La homo aŭ la materio - kio estas malsupera - ne povas krei la Spiriton - kio estas io supera kaj nemateria."

VALO

KIUJ KULPAS PRI KONFUZOJ?

(vd. L! 88, p.7/9)

Jes, pri la konfuzo inter nacio kaj ŝtato kulpas la francaj naciistoj, kiuj inventis dum la Franca Revolucio la principon, ke la franca nacio estas suverena. Mi bedaŭras, ke tiun konfuzon ne vidis korsikaj naciistoj. Kaj mi bedaŭras, ke Lanti ne vidis tiun konfuzon. Tio pravas, ke ili ne estis pli saĝaj ol francaj naciistoj.

Pri Vaskio (aŭ Eŭskio), aŭ mi estas misinformita de francaj ĵurnalistoj, aŭ ETA pli kaj pli perdas adeptojn, kaj baldaŭ unuigos ĉiujn vaskojn kontraŭ siajn metodojn. Ŝajnas, ke hispaniaj vaskoj majoritate kontentas pri la nuna Hispanio. La Hispanio de Franco estis nur kastilia, dum la nuna hispana ŝtato agnoskas sian plurnaciecon. Tio perdis adeptojn al la iamaj naciistaj partioj. Se Francio volas malpliigi la influon de siaj propraj naciistoj, kial ĝi ne estas sufiĉe saĝa por mem agnoski la plurnaciecon de la franca respubliko? Ĉu tio estas en Francio tabua temo?

Komprenibile, ankaŭ la problemoj pri Kanakio solviĝos nur per la agnosko, ke la insularo estas plurnacia. Bedaŭrinde, la nuna franca juro ne permesas agnoski la plurnaciecon de teritorio, kiu apartenas al la franca respubliko.

Se oni konstruos la komunan eŭropan domon, ĉu estos unu granda ĉambrego por ĉiuj "francoj", unu granda ĉambrego por ĉiuj "italoj", unu granda ĉambrego por ĉiuj "germano" ktp, aŭ ĉu eblas konstrui la domon tiel, ke estu ĉambreto por la venecianoj, ĉambreto por la toskanoj,

ĉambreto por la bavaroj, ĉambreto por la prusoj, ĉambreto por la korsikanoj, ktp, ktp? Ne diru, ke tio metus grandan lingvan problemon : solvo de tiu problemo ekzistas jam de 1887!

Kiuj kulpas pro tio ke, estante SAT-ano de 1974, mi devis atendi ĝis marto 1990a por ekscii, ke raciismo povas esti io alia, ol sciencadorado? Mi legis atente ĉiujn "liberpensajn" rubrikojn de ĉiuj ekzempleroj de Sennaciulo, kiujn mi ricevis. Ke aperis nur stultaĵoj kaj fanatikaĵoj, ĉu pri tio kulpas mi legantino? Kiam argumento estas inteligenta, ankaŭ mi tion vidas. Antaŭhieraŭ mi ricevis la martan numeron de Sennaciulo, kaj hieraŭ mi enpoŝtigis du leterojn :

- unu al la raciista unuiĝo, por peti pliajn informojn
- unu al la moskeo de Strasburgo por demandi, kie mia alĝeria korespondanto povos aĉeti viandon dum sia baldaŭa restado ĉe mi.

Kiel mi legas en Sennaciulo jam de 1974, ĉiuj kristanoj estas fanatikuloj, kiujn la Plenum-Komitato devas senkompatate cenzuri antaŭ, ol ili trudos al SAT siajn diaĵojn...
Jakelino

SIMPLA RIMARKIGO pri la letero de S-ro Alex Clabaut, ktp (Laŭte n-ro 88)

Ĉar supozeble mi estas la sola membro de la Akademio, kiu abonas "Laŭte!" (?), kaj ĉar mi rekte ricevis la leteron de niaj tri aŭtoroj, kiuj evitis doni al mi sian adreson, do mi petas de la Redakcio, kiu iomete simpligis la tekston el bonintenca motivo, doni tiun mian rimarkigon.

Bedaŭrinde la frazo formetita verŝajne estis la plej interesa en la tuto! Efektive oni legas "... ni povas aserti, ke ili preskaŭ ĉiuj (krom 2 kiujn ni notis ...) uzas la vorton "Koreio"...); do mankas la fino de la parentezo.

La aŭtoroj notis, ke du Esperantistoj uzis la landnomon "Koreo", sed ni ne scias, kion ili komentis pri tio. Diablo! Ĉu eble oni notis ilin sur ruĝan liston de punindaj E-istoj? Kio rezultos por ili el tiu *timinda prinotado*?

Nu! mi povas raporti, ke la afero ne estas tiel drasta kaj danĝera por tiuj niaj du samideanoj el Koreo, sed ke la originala teksto komentis jene - mi tamen citas el memoro :

"Krom 2 kiujn ni notis, sed ni povas aserti, ke tion ili ne faris kun speciala intenco". Eble la redakcio povos ankoraŭ kontroli la ĝustecon de mia memoro.

Tio estas ege interesa, ĉar jam de 85 jaroj multaj E-istoj sur la tuta planedo uzadis la landnomon "Koreo" same tiel *sen speciala intenco*.

Kaj estas evidente, ke tiuj multaj E-istoj uzadis "senintence" la ĝustan nomon *Koreo*, ĉar ili konis la nomon *Kore- el sia lingvo, same kiel almenaŭ tri homoj el kvar sur nia planedo : ili de si mem kaj sen aparta pripenso aplikis la Fundamenton kaj ties 15-an Regulon pri la *internaciaj vortoj* : kaj ĉi tie ne temas pri ordinara vorto, sed ja pri *propra nomo*. Nu! Neniu rajtas ŝanĝi la proprajn nomojn.

Male estas certe, ke la vorto *Koreujo* proponita de la Koreanoj, vorton kiun aliaj volas legi *Koreio*, do ne same kiel niaj Koreaj amikoj, ne povos veni aŭtomate sub la plumo aŭ el la buŝo de niaj samideanoj. Ĝi povos veni nur el trudo kaj tion bone scias la teoriistoj de la Korea asocio : ĝuste pro tio ili pagis plenan paĝon da reklamo por diskonigi sian trudan volon en la konata magazino *Monato*!!

Cetere la Akademio donis sian verdikton eldonante sian Liston de Normaj Landnomoj. Pri la nomo *Koreo* ĝi havis okazon voĉdoni trifoje pozitive kaj ĝi eldonis ankaŭ apartan bultenon de la *Oficialaj Informoj* kaj pri tiu nomo *Koreo* kaj pri la nomo *Egipto*. Ni aldonas la parton de tiu *O.I.* pri la landnomo *Koreo*.

Por la voĉdono pri tiu aparta teksto pri *Koreo* ĉiuj Ak-anoj havis sub la okuloj la ukazon de la Korea asocio (9-an de Aprilo 1984) pri la nomo de sia lando : ĝi prefere ja misimpresis kaj neniel retenis ilin!

Ĉi-rilate tute pravas *Jakelina* en sia humura artikolo pri fromaĝoj : oni ne modifu la nomojn de fromaĝoj! Oni ne kreu por Esperanto nomojn de fromaĝoj, ne pli ol por kiu ajn lingvo : la fabrikantoj jam kreis tiujn nomojn. Ili ne plu bezonas esti kreitaj! Ni maksimume donu al tiuj nomoj taŭgan Esperantan formon.

Cetere plej ofte, estos pli realisme konservi al tiuj fromaĝoj eĉ ilian nomon en la aŭtenta ortografio. Sed pri tio eblas diskuti, laŭ la fromaĝogusto!

Kaj ĉu vi ne opinias, ke tio, kio estas vera por fromaĝoj, certe devas esti cent-foje pli vera por landnomoj?

*

Tamen notu, ke la rolo de la Akademio ne estas proponi esperantigon de fromaĝonomoj, ne pli ol de landnomoj : la Akademio intervenas nur por diri, kiu el du nomoj en uzado estas pli bona, t.e. tiu, kiu pli bone respektas la fundamentajn principojn de la lingvo kaj la Fundamenton mem!

Ja por tio Zamenhof kreis niajn lingvajn instancojn.

André ALBAULT

KOBOLDO ENŜOVIĜIS SENAVERTE...

en la artikolon "Denove pri *La Danĝera Lingvo*", p.3, linio 12a. Tiel R. Grandière fariĝis arestita de Gustav WEBER en Vieno, anstataŭ ĉe G.W., kio evidente tute ŝanĝas la sencon de lia reĝustigo.

Alia koboldo (eble la sama?) tajpigis al la kompatinda red. unuapaĝe de la nova broŝuro "Kial mi estas ateisto" : "Liber-ecana Frakcio de SAT", dum ja tiu broŝuro aperas en la kadro de la *Liberpensula*. Feliĉe, plejmultaj liberecanoj en SAT estas ankaŭ liberpensuloj, kaj relative multaj liberpensuloj estas liberecanoj... Tamen, kiu renkontos tiun koboldon, tiu senhezite pugofrapu ĝin!

Ĉar se neniu intervenos, kiel statos la prestiĝo de nia supersūtita broŝurulo?

Des pli da dankoj al tiuj, kiuj sendas siajn artikolojn jam prespretaj!

KVAZAŬ RECENZE

En ĉiu kajero de *Laŭte!* mi trovas tre interesajn tekstojn. El la numero 88 mi notis jenajn :

1. **Jakelino**. Unu homaro, 365 fromaĝoj.

Mi ne vidas, kial la 365 francaj fromaĝoj, kaj la nederlandaj, la svisaj, la italaj, la germanaj, la britaj, kc, ne povus ricevi esperantajn nomojn, en faka terminaro, kiel, por ekzemplo, la rusa supo barĉo en la Fundamenta vortaro.

2. **Sergei Stepanov**. Kiamaniere, en daŭro de kvin horoj, ellerni skribi versojn.

La aŭtoro prave konstatas, ke tro multaj esperantistoj ne observas la konsilon : lasu la versfaradon al poetoj. Kaj ke, cetere, ne ĉiuj poetoj lernis konvene versfaradi. Li ankaŭ prave notis, pri proza verkado, la konsilon de Bualo, "kiu rekomendis dudekfoje reprimlabori verkaĵon" (Lanti) kaj tiun alian rimarkon de Lanti : "Flober ne estis mokinda, kiu, siavice, ŝvitis dum 12 horoj por verki nur 2-3 paĝojn." Mi konfesas, ke mi mem skribas tro rapide, kaj ne sufiĉe poluras miajn frazojn - sed mi ne estas aŭtenta verkisto kiel Bualo aŭ Flober.

Koncerne versojn, certe la afero estas ankoraŭ pli malfacila, kaj necesigas pli da penado. Unu detalo : la rimo. Ĝi ja estas tre ofte elemento de beleco - sed ĝi ne estas nepre necesa. En ĉiuj lingvoj ekzistas belaj poemoj en senrimaj versoj. Por mi ekzempla estas la provencalingva "Pouemo dou Rose" (La Poemo de Rodano). Escepta en la verkaro de Frederi Mistral, kiu majstre versfaradis en **Mirèio, Calendal**, kc, tiu poemo estas verkita (krom du aŭ tri kanzonoj) en senrimaj versoj, tamen ĝi estas tre bela. Ĉar tio multe plifaciligas kiel eble plej fidelan tradukon, mi esperantigis ĝin, same evitante rimojn kaj eĉ a onancojn, sed ĉiam observante la ritmon de la versoj. Ĉu mia traduko estas inda je la originalo? Certe ne. Tiuj legantoj, kiuj intime konas la provencan lingvon, prefere legu "La Pouemo"n ol la Poemon. Tiel ili ĝuos ĝian plenan belecon.

3. "La Evangelio de la Horo" de P. Berthelot.

Pri P. Berthelot, fondinto de la revuo "Esperanto" mi ĉerpas jenajn precizaĵojn el **Histoire du Mouvement Espérantiste en Roussillon**, de J. Amouroux kaj M.T. Lloancy : Naskite en 1881 en Auxerre, li estis "natura" filo (bastardo) de Paul Bert, eks-ministro de Publika Instruado kaj Guberniestro de la franca Hindo-Ĉinio (nun Vjetnamio).

Treege inteligenta, li ricevis en 1902 la premion pri historio en la "Ĝenerala Konkurso" inter francaj liceanoj. Kandidato al Politeknika Lernejo, li brile sukcesis la unuan parton de la konkurso, sed fiaskis en la dua, tial ke li draste (kaj prave) kontraŭdiris ekzameniston pri matematiko. Li esperantistiĝis en 1899, en Reims, kaj estis elektita membro de la Lingva Komitato en 1909.

En 1906 en Ĝenevo Berthelot aktive partoprenis en la preparado de la 2a universala kongreso. En tiu sama jaro li vendis la revuon "Esperanto" al H. Hodler, kiu en 1908, fondinte UEA, faris el ĝi la oficialan organon de la asocio.

Perdinte la kristanan kredon en sia 19a jaro, Berthelot provis sinsekve diversajn sistemojn : spiritualismon, determinismon, socialismon, anarkismon. Fine, akceptite kaj flegite de katolikaj monaĥoj en la Misio de Conceição de Araguaya (ŝtato Para) li rekonvertiĝis, kaj mortis kiel katoliko (pro tuberkulozo, 1910).

Stranga vivovojo, vere!

VALO

Deziras korespondi :

Weinreich LÁSZLÓ, Páfrány U.1/A, H-7633 PÉCS, Hungario

("Mi estas 20-jara poŝtisto. Mi loĝas kun mia patrino kaj du fratoj. Mi kolektas la poŝtmarkojn, korespondos kun iu kiu kolektas poŝtmarkojn...")

Maksimov GENADIJ, Rūpniecibas str. 18B, 4a, SU-228500 CESIS, Latvio

("Mi estas 13-jara knabo. Mi interesiĝas pri matematiko, fiziko, lingvoj ktp. Antaŭ nelonga tempo mi komencis lerni la francan kaj mi volus praktiki ĝin. Do mi volus korespondi Esperante kaj France, kaj ankaŭ interŝanĝi revuojn, librojn, poŝtmarkojn, ktp...")

KELKAJ VORTOJ PRI MAJSTRECO

(skribi poemojn kaj taksi poemojn)

Kun intereso mi legis "**Kiamaniere, en daŭro de kvin horoj, ellerni skribi versojn**" de nova aŭtoro de "Laŭte!" Sergej Stepanov. Tamen estas malfacile konsenti kun liaj konkludoj. La aŭtoro citas plaĉan kaj tre vaste atantan poemeton de Julio Baghy kun refreno "estas mi esperantisto" kaj invitas ĉiujn poetojn: "imitu lian majstrecon". Mi ŝatas la poemeton, pro ĝia subtila ironio pri esperantista popolo. Tamen konsideri tiun poemeton imitinda ĉefverko? - nu, pardonon. Adasismaj rimoj "bretarovortaro", "konas-abonas", "verkisto-esperantisto"... Ĉu vere TIO estas imitinda? Meva Maron per sia eksperimenta poemeto (kiun la aŭtoro citas fuŝe - ĉar sen kursivaj neologismoj - kaj nekomplete - perdinte la duan strofon) provas montri ke :

1. Esperanto bezonas neologismojn, sed ne nepre unu(kelk) silabajn sinonimojn por "malvortoj" (kiel ekzemple proponas Eŭgeno Belonenko, uzante vorton "**vraĝo**" por malplaĉa tro longa "malamiko"). Esperanto bezonas neologismojn por nomi plantojn, rarajn bestojn, papiliojn ktp. Samon proponas Jakelino en "Laŭte!"-88, parolante pri 365 francaj fromaĝoj, kiuj bezonas havi nomojn ankaŭ en Esp.

2. ke adasismaj rimoj (per kiuj abundas "imitinda" poemeto de Baghy) jam estas eluzitaj kaj necesas serĉi novajn rimojn, kiel "**ĉirinko-trinki**", "**vikunoj-kuna**" ktp. Ŝajnas al mi, ke ĝuste TIO estas serioza laboro, kiun sopiras s-ro Stepanov, sed ne mizeraj, milfoje uzitaj "revoj-mevoj", "vojo-ĝojo", "rapido-revido", per kiuj abundas esperantaj poemoj. Strange, ke l'aŭtoro tute ne rimarkis ke tiu eksperimenta versfarado de Meva Maron reeĥas al iamaj serĉoj de ekzempla Majakovskij, ĉar ŝi serĉas rimojn, kiujn ne eblas trovi en rimvortaroj. Dum pri "konas-abonas", "verkisto-esperantisto" nuna poeto nur hontus.

Nu, sed ĉiu rajtas havi sian propran guston. Kio donas "veran plezuron" al iu homo, malmulte plezurigas alian,

kio enuigas iun, fascinas alian. Ideala varianto do estas, ke ĉiu poeziŝatanto povu trovi ion nutran por si. Feliĉe, en Esperantujo ne ĉiuj imitas Baghy, kelkaj serĉas sian propran vojon. Kaj ni ne vivas en totalisma ŝtato, kie ĉiu devas verki laŭ ŝablono, elektita de regantoj.

Pri Majakovskij. La poeto estis fantaziriĉa, tre inventema kaj lia kontribuo por la rusa poezio estas konsiderinde granda (eĉ se multaj kritikistoj grincis per dentoj, legante liajn poemojn). Malgraŭ tio mi ne apartenas al adorantoj de Majakovskij. Tute eblas, ke multon fuŝis lerneja instruado. Mi ĝis nun memoras kiel en la lernejo (jaro: 1975) necesis parkerigi longan poemon de Majakovskij pri "ruĝhaŭta libreto", t.e. sovetia pasporto. Mi sidis preĝante, ke la instruistino ne voku min deklami ĝin. Ja mi abomenis la poemon. Kaj sentis nenian fieron esti civitano de totalisma ŝtato, nomata USSR. Deklamonto DEVIS montri entuziasmon kaj feliĉon - mi ilin ne havis! Povraj samklasanoj deklamis: "**Legu, enĉiu - mi estas civitano de Soveta Unio**" Mi abomenis sovetian ŝovinismon de tiu poemo, parolanta superece pri "diversaj ceteraj svedoj" (interesas min, kiel svedoj legas tiun poemon?) Krom tio mi ne certas, ĉu vere ĉiuj verkoj de Majakovskij estas samnivele elstaraj kaj ĉu li vere "neniam uzis en siaj poemoj rimojn, kiujn oni povas trovi en ia rimvortaro". Bv. pruvi tion. Laŭ mi en bona rimvortaro multaj el ili troviĝis. Sed multajn Majakovskij enkondukis la unua - pri tio mi konsentas.

Oksana.

Pardonu miajn ŭaojn kaj ronkojn, k-do SS! Fakte mi posedas poemaron de Majakovski, sed supozis lin nenion verkinta inter 1917 kaj 1930. Nenion krom

*Nenie krom
ĉe MosSelProm*

- Ĉu iu bazaro? Supozeble la daŭrigo tekstas "vi trovos karotojn".

Nu - mi ĵus refoliumis mian libron (post 20 jaroj?) kaj trovis ke laŭ paĝnumeroj li multege verkis tiutempe, tamen iu elŝiris la paĝojn, mi restis en nescio, "kiel fari versojn", je l'nivelo de "Spinfluto" aŭ "Nubo en Pantalono" (ankoraŭ sen enpoŝaj pan-talonoj!)

Finsaluton!

Meva Maron

NACIIISMO SENNACIIISMO

Ĉu plibonigi la ĉiuhomajn vivkondiĉojn surtere ne devas esti la celo de ĉiuj ?

Kiam nacioj longtempe submetitaj liberiĝas, ties loĝantoj ĝojas, ke ili libere vivos sen **subpremo, ekspluatado**, laŭ siaj **kutimoj kaj religio**, parolante sian propran **lingvon** sur sia propra teritorio, interne de **siaj landlimoj**. Ili opinias, ke tio estos progreso kaj paŝo al feliĉo por ĉiuj.

Sennaciistoj opinias, ke multoblige landlimojn estas regreso.

Naciismo kaj sennaciismo povas esti nur irejoj, ĉar por plibonigi la vivon de ĉiuj, la homoj eklernigu ankaŭ la manieron vivi kune, ĉu interne de landlimoj, ĉu sen landlimoj. Sed kia estas la plej bona vojo ?

Ĉu en libera nacio ĉiuj estas liberaj ? Tre certe ne, vidu ekzemple Ĉinion kaj Iranion, kiuj estas ŝajne el la plej liberigitaj landoj, ĉar iliaj estroj agas tute laŭvole, kia ajn estas la opinio, la deziro, la volo de ĉiuj aliaj ŝtatoj. Ĉu ĉiuj ĉinoj aŭ iranoj estas liberaj ?

En Usono, la plej riĉa nacio, ĉu ĉiu estas riĉa ? Ĝi estas ankaŭ la nacio, kiu enhavas la plej famkonatajn universitatojn, sed ĉu ĉiu, kiu deziras kaj kapablas, povas eniri tiujn universitatojn, ktp ?

Same, en Francio, la lando mem de la homrajtoj, oni diras, ĉu ne troviĝas homoj enkarcerigitaj dum jaroj antaŭ ol esti juĝataj ?

Do, libera nacio ne prezentas certecon de libera feliĉa vivo por ĉiuj, sed tion oni povas diri ankaŭ pri nacigrupoj, ŝtatblokoj, imperioj, kaj, kial ne, pri tutunuigita mondo.

Por pliprofundigi la problemojn ni dispartigu ilin.

*

SUBPREMO

Dum ĉiuj historiaj tempoj, nacioj subpremis aŭ estis subpremitaj, laŭvice.

Nacio estas abstrakta termino. Ni pensu pri la homoj. Ĉu nacioj subpremis aliajn naciojn? Ekzemple, dum la regado de Napoleono la Unua, la franca nacio subpremis la tutan Eŭropon. Ĉu tio signifas, ke tiu malfeliĉulo perforte rekrutigita en Francio subpremis tiun loĝanton de iu malproksima lando, pri kiu li eĉ nenion sciis? Ĉu ankaŭ li ne estis subpremita de militistoj subpremantaj Eŭropon?

Aliparte, el kio konsistis la franca nacio? El etaj landoj, kiujn oni povas nomi ĉu provincoj, ĉu nacioj. Unu estis la korsika nacio, de kie devenis tiu Napoleono. Ĉu oni povas diri: Korsikio subpremis Eŭropon? Same oni povas diri: dum la stalina regado Georgio subpremis la aliajn naciojn de Sovetio, ĉar Stalino estis georgiano?

Sed je la nomo de Francio Napoleono militis tra la tuta Eŭropo. Tre certe multaj francoj stulte fieris pro tiuj venkoj, kaj la kulpo de la aliaj estis, ke ili ne deziris aŭ ne povis ribeli kontraŭ la napoleona povo, kaj forpeli lin.

Laŭ mi, Eŭropo estis subpremita de militistoj kuntrenitaj de iu, kiu profitis la ĥaoson por sin prezenti kiel savanto reordiganta la landon. Eble mia analizo estas erara? Se ne, ĉu oni ne povas apliki ĝin al multaj aliaj "naciaj" subpremoj?

Ĉu en liberigonta nacio ne levigōs tiu savulo? Ĉu ankaŭ en nacigrupoj tio ne povus okazi? Kaj ĉu estas certe, ke tio ne povus okazi en mondo sen landlimoj?

EKSPLUATADO

De ĉiam homoj ekspluatadis aliajn homojn. Kiam la nacioj povis vivi kvazaŭ aŭtarcie, ekspluatado okazis interne. Nun tiu ekspluatado flugas super la landlimoj. Ne necesas konkeri landojn, starigi imperiojn por tio. Liberaj landoj povas ekspluati aliajn liberajn landojn.

Sed ĉu ni ne povus pli bone diri: homoj el liberaj landoj ekspluatas jen homojn de sia lando, jen homojn el aliaj liberaj landoj, laŭ sia profito? Sed ĉu temas pri homoj, kun kiuj oni povus interparoli? Temas pri nebulaj aroj de firmaoj, bankoj, financaj grupoj intermiksitaĵoj, kontraŭ kiuj ne eblas lukti. Plie, ŝajnas ofte, ke neniuj povas direkti tiun nebulan, nedefinitan monstron, eĉ tiuj, kiuj konsistigas ĝin. Ŝajnas, ke temas pri neevitebla malsano. Vidu: la nove liberigitaj orienteŭropaj landoj vokas la grandajn okcidentajn industriistojn, ke ili starigu firmaojn por laborigi la senlaborulojn, kaj iom riĉigi tiujn naciojn. Tiom longe kiom la homoj devos labori por vivi, kaj tiom longe profitos direktos la homaron, tio ŝajnas neevitebla.

Ni ne forgesu ankaŭ, ke landlimoj ne ĝenas, male helpas pro malsamaj monkurzoj la spekulistojn, kiuj tiel riĉiĝas per malprofito de aliuloj.

Tio estas tutmonda problemo.

POLUCIO

Ekde la unua rigardo, ĉiu konscias, ke tiu temo estas ankaŭ tutmonda afero.

Se Ukraino sukcesas ĉesigi la funkciadon de la tieaj atomcentraloj, estos nur duonsukceso. En kazo de difektigo ĉe centralo situanta tute proksime (ekz. Smolenska aŭ Voroneĵa centralo, kiel estas notite en la alvoko de la ukraina plenumkomitato), landlimo ne protektos kontraŭ polucio. Ankaŭ en Francio, se la nuklea centralo de Chooz eksplodus, la belgoj suferus tiom, kiom la francoj.

Same por aliaj polucioj. Vidu la Rejnan polucion: ses nacioj tuŝas la bordojn de Rejno. Ili devas agi kune. Unu nura nacio nenion solvos.

Aliparte, ĉu estas certe, ke neniuj venonta Ukrainaj estro decidus estonte starigi kromajn centralojn? Francio - oni diras - estas demokratia lando ne submetita al alia ŝtato. Ĉu vi opinias, ke la atomcentraloj tie starigitaj rezultas el la volo de la civitanoj?

VIVMANIERO, KUTIMOJ, RELIGIO, LINGVO

Pri tiuj temoj, liberigita nacio povos tute libere leĝojn

fari, sen iu eksterlanda malhelpo. Sed ni ne forgesu, ke nuntempe ĉiu nacio, eĉ malgranda, entenas minoritatojn, kiuj havas malsamajn kutimojn, religiojn, foje lingvon. Ĉu ne estas risko, ke ankaŭ la antaŭe subpremita nacio subpremos siajn minoritatojn ? Plie, ne forgesu, ke landlimoj estas artefaritaj muroj starigitaj sekve de pasintaj militoj, laŭ venko de iu aŭ de la alia, ke ofte samnacionoj estas dispartigitaj ambaŭflanke de tiu landlimo, ke popolaroj estis punezilitaj ktp.

Aliparte, en nacio, kies loĝantoj havas samajn kutimojn, religion, lingvon, ĉu la vivmaniero de ĉiuj estas sama ? Ĉu ekzemple vivmaniero de iu montarano ne pli similas al tiu de alia montarano je la alia flanko de la landlimo ol al tiu de samnacia urbano ? Ĉu almozetanto ne estas frato de eksterlanda almozetanto ? Pri riĉuloj mi dubas, ĉu oni povas paroli pri frateco, sed certas, ke malsamlandaj riĉuloj sentas sin pli proksimaj ol ili estas de samlanda almozetanto.

Pri la lingvo mi ne multe skribos, ĉar la temo estis kaj estos debatita multfoje de personoj pli kompetentaj ol mi. Mi nur diros, ke tre certe estas agrable paroli, studi, verki, fari leĝojn en sia etna lingvo, sed, krom la problemo de eventuala minoritata lingvo en la sama nacio, oni povas rimarki, ke se etna lingvo tute taŭgas en familia, regiona vivo, ĉu ĝi ne alportas malfacilaĵojn por la eksterlandaj rilatoj kaj por la altnivelaj lernadoj, ĉefe teknikaj?

Konklude :

- En sennacia mondo interŝtataj militoj malaperos.
- Tutmondaj problemoj pli facile solviĝos.
- Sed forigi landlimojn ne solvos la individuajn problemojn: vivnivelo, vivkondiĉoj, individua libereco.
- En sennacia mondo, la naciistoj timas, ke iliaj kulturoj malaperos, sed eĉ en mondo dividita la vivmanieroj de ĉiuj pli kaj pli similiĝas pro internaciaj ekonomiaj kaj financaj kondiĉoj, tutmondaj informkomunikiloj, rapidaj vojaĝrimedoj. Sed kial en homaro, kie la individua libereco estus starigita, la intelekta kaj arta vivo de etnaj grupoj ne povus libere disvolviĝi same kiel la individua ?

Sed, kiel stulta mi estas ! Mi komparis sennacian mondon kun mondo dividita en nacioj, kvazaŭ ni povus elekti!

Nuntempe ne plu estas tempo de nacioj, nek estas tempo de sennacia mondo, estas tempo de ŝtatblokoj. La okcidenteŭropaj landoj eniras blokon, la orienteŭropaj landoj eliras el bloko sed tre certe, pro ekonomiaj motivoj, devos kontrakti kun aliaj ŝtatoj. Ĉu tiuj kontraktoj ne iĝos pli kaj pli streĉaj ? Kompreneble, libere elekti kontraktojn estas preferinde ol suferi subpremon. Dum tiu duonlibera tempo ĉu tamen ne estas risko, ke la novliberigitaj nacioj iĝos agresemaj ĉu kontraŭ najbaraj landoj, ĉu kontraŭ siaj propraj minoritatoj ?

Aliparte, ĝis nun nacioj unuiĝis por venki aliajn naciojn. La risko de militoj inter blokoj ŝajnas malpligrandiĝi, sed alia milito komenciĝis : industria/komerca/financa milito. Ĉu ne estas risko, ke potencaj blokoj unuiĝos kontraŭ malpli potencaj nacioj ?

Ĉu tiu temo ne estu nia nuntempa prizorgo ?

Renée MEURANT

N.B. - Kvankam mi bone scias la diferencon inter nacio kaj ŝtato, mi uzis la vorton nacio kun la nuntempa senco, kiu miksas ambaŭ signifojn. Laŭ mi, en tiu teksto ne gravas tiu diferenco.

Kontribuoj de Marie Bartovská, Ĉeĥoslovakio :

En L! 84 mi legas : "Ankoraŭ unu heroaĵo de religia fanatiko." Laŭ la lasta frazo la aŭtoro "ĵetas ĉiujn religiojn en unu sakon". Serĉu bonvole pli da informoj. Ne estas sama Dio pardonema kaj Alaho muzulmana, kiu ordonas murdi malamikojn. Komparu Homejni-n, kiu ordonis murdi la verkiston, kaj la papon, kiu pardonis al krimulo, kiu lin volis pafmortigi. Ie vi skribis, ke en Parizo oni ekbruligis kinejon pro kontraŭkristana filmo. Se tio okazis, do eble ĝin faris ateista provokanto, maksimume nenormala homo, ne vera kristano.

En L! 86, p.21-22 : "Kial agi simple, se eblas komplike" diras popola spritaĵo. Se oni ĉi tiun artikolon ne rigardus kiel ŝercon, oni devus freneziĝi. Sed tia ŝerco estas iom drasta. Sed ĝin iu komencanto povus rigardi serioze kaj kun hirtaj haroj forkuri kaj neniam plu voli ion aŭdi pri Esperanto.

Pri la sufikso -iĝ-

En pasintjara **Juna Amiko** mi trovis instruon pri la afikso -iĝ-. En Fundamento donis doktoro Zamenhof al ĝi la signifon de senvola ŝanĝo kaj laŭ la naciaj lingvoj signifon refleksivan. Tamen en siaj **Lingvaj Respondoj** li konstatis, ke la fundamenta vorto "sidiĝi" ne estas ĝusta, do praktike, ke la afikso iĝ ne taŭgas pro reflekso. (Klare, simple kaj ĝuste oni diras "eksidi"). Do, por komenco de ago taŭgas la prefikso ek-. Oni ne stariĝas sed ekstaras. Oni ne iĝas stara aŭ staro, sida aŭ sido ktp. Se oni nepre volus uzi -iĝ-, necesus diri "sidantiĝi, starantiĝi" ktp. Kuniĝi = iĝi kunaj.

Kiu enbusiĝas, tiu estos en buso : tute simpla situacio, sen alia afikso aŭ finaĵo.

Speciale mise oni ĝin uzas en la vorto "interesiĝi". ĝi reboniĝis = ĝi iĝis ree bona = ĝi ree estas bona = ĝi bonas (stato).

li interesiĝas = li iĝas interesa = li estas interesa = li interesas (iun).

Interesiĝantoj kunvenos = kunvenos tiuj, kiuj ne estis interesaj, sed baldaŭ estos interesaj = ili interesos (nin).

Tamen en la artikolo ĝi signifis : Kiun interesas la programo, kunvenos. Do ne estis interesaj la homoj, sed la programo kaj do la programo povas iĝi interesa. Min interese la programo, mi estas interesata per la programo, mi interesatas.

Sed oni devas trakti ĉiujn transitivajn verbojn sur la 14a paĝo de **Juna Amiko**, aprilo 1989.

Marie Barstovská.

la venonta numero aperos fine de novembro

AL NIKOLINA PEJRUO (=Nicole PAIROUX) -pantuneto-

Ja kantas Nikolina NUR PER AMO,
en la HAVENO kun INVIT' AL ĜOJO;
per JULA LANDO kreskis ŝia famo;
plezuras sekvi ŝin laŭ tiu vojo!

En la HAVENO kun INVIT' AL ĜOJO,
LA ESPERANT'-KNABINO: Jen surprizo!
Plezuras sekvi ŝin laŭ tio vojo,
ĉar nun PARIZ' NE ESTAS PLU PARIZO!

LA ESPERANT'-KNABINO: Jen surprizo!
Ŝi, tra Eŭrop', turneas kun aklamo, (*)
ĉar nun PARIZ' NE ESTAS PLU PARIZO!
Ja kantas Nikolina NUR PER AMO!

(*) Laŭ informo en iLAŬTE! N° 88 (p.2^a).

ERGOTO DE BONAERO

AL RENE MERANTO (=Renée MEURANT) -pantuneto-

En LAŬTE! verkas nun Rene' MERANTO;
eskapas ŝi realon per revado,
pri l' Absoluto estas ŝi dubanto!
Sed relativas nia ekzistado!

Eskapas ŝi realon per revado;
la korpo en atomojn ja disiĝos,
ĉar relativas nia ekzistado,
sed la anim' al Dio unuiĝos!

La korpo en atomojn ja disiĝos;
nur mankas al ŝi fido de l' fidanto,
ĉar la anim' al Dio unuiĝos!
En LAŬTE! verkas nun Rene' MERANTO! (*)

ERGOTO DE BONAERO

(*) En LAŬTE! N° 88.

AL ĴAKELINA LEPEO (=Jacqueline LEPEIX), kiu subskribas siajn artikolojn per la vira plumnomo: Jakelino! Si ja estas la Georgo SANDO de Esperantujo!

-pantuneto-

Vulkanas la spirit' de Ĵakelina,
la pensoj el ŝi fluas erupcie!
Tre milde batas ŝia kor' virina,
sed verkas ŝi spite kaj defie!

La pensoj el ŝi fluas erupcie,
laŭdindas ŝiaj forto kaj obstino,
ĉar verkas ŝi spite kaj defie!
Aktivas ŝi kun firma determino!

Laŭdindas ŝiaj forto kaj obstino,
ŝi certe estas homo nerutina!
Aktivas ŝi kun firma determino;
vulkanas la spirit' de Ĵakelina!

ERGOTO DE BONAERO

AL SUZANA KALASO (=Suzanne CALAS) -pantuneto-

Ĉu post la morto, daŭros nia vivo?
-mi jam demandis al Suzan' KALASO-!
Ja poste sekvos nova intensivo,
ĉar trafe nin direktas la kompasoj!

Mi nun demandas al Suzan' KALASO:
Ĉu homo estas simple nur racio?
Ĉar trafe nin direktas la kompasoj,
la homo estas ankaŭ emocio!

Ĉu homo estas simple nur racio,
kaj la ekzisto nur sencela drivo?
La homo estas ankaŭ emocio!
Ja post la morto, daŭros nia vivo!

ERGOTO DE BONAERO

INFANOJ INVADAS NIAN MUELEJON...

Dum la lasta semajno de julio, la muelejo de Beauville spertis novan junecon pro la ĉeesto de ok gajaj infanoj, energiplenaj malgraŭ prema varmego.

Ses venis el la regiono de Nimes, akompanataj de Andrea GAUSSEN, kiu instruis al ili esperanton dum la lerneja jaro. Milan, sep-jara nederlandano tuj iĝis parto de la grupo, same kiel Sabrina ("kvarjara kaj duono"), kiu plej nature babilas, ludas, petolas en esperanto, ŝia patra lingvo.

Kion faris tiuj infanoj dum sia restado en la muelejo? Oni vidis ilin tre serioze fiŝkapti en la sekiĝinta rivero por savi la mortantajn fiŝojn, kuiru, purigi la muelejon (ĉefe la banĉambbron per multe da akvo), zorgi pri la kokinoj, anasoj kaj aliaj bestoj, ludi, registri siajn rakontojn kaj skeĉojn sur kasedo, kanti, ekskursi, organizi vesperan spektaklon... kaj eĉ lerni esperanton dum du horoj tage. Sed pli bone estas lasi ilin mem rakonti, ankaŭ pri siaj problemetoj (vundo kaj malsano):

"Komence de la posttagmezo Aline fiŝkaptis proksimume kvardek fiŝojn: dek grandajn kaj tridek malgrandajn."

SEBASTIEN


"Aline kaj mi renkontis Gastonon. Li estas maljunulo. Li aranĝis la riveron.

Dimanĉon, ni renkontis la skoltojn. Ili estas dek personoj tre afablaj.

Ili fariĝis miaj geamikoj. Ni ludis per akvo kaj fine ni estis tute malsekaj.

Lundon, mi estis malsana kaj mi kuŝis..."

NADEGE



"Mi faris du kukojn kun citrono kaj ĉokolado. Ili estis bon-
gustaj."

VANESSA G.

"Mi volis salti super barilo el lado. La dekstra kruro tuŝis
la ladon. La sango fluis. Estis profunda fendo. Sinjorino
Gaussen transportis min al la kuracisto de la vilaĝo."

VANESSA M.

"Ni iris al la groto. Ni vidis stalaktitojn kaj stalagmitojn.
Ni malsupreniris du ŝtuparojn."

GERALD

"Mi lernis paroli esperanton kun Katerina. Mi ludis kun
Ĝeraldo."

MILAN.

"Dimanĉon ni iris al Puymirol, 25 kilometrojn de Beau-
ville, ĉar tie estis festo. Ni rigardis teatraĵon: "La mal-
granda fingrulo."

ALINE.

Kio restos post la reveno hejmen ?

* Tiuj infanoj aŭdis esperanton uzatan en ĉiutaga vivo. Ili
uzis ĝin en realaj situacioj (por peti, danki, proponi, fari
recepton...) kaj spertis, ke ĝi povas funkcii. Plej frapis
ilin la infanaj babiladoj de Sabrina.

* Ili konsciis, ke ili kapablas rakonti, teatri, ludi en es-
peranto kaj konservis kasedon kaj kajeron kiel spurojn de
siaj travivaĵoj kaj de siaj atingoj.


* La deziro rilati kun la nederlanda amiketo Milan, kiu ne
komprenis la francan, estis eble la plej forta instigo am-
baŭflanke por plu lerni.

Ĝis venonta jaro !



PASKON 1991

Kongreso de SAT - Amikaro en AMBOISE - Nazelles



KONGRES-TEMO:

Luaro, protektenida sovaĝa riverego
ne estas limo, sed kultura kerno ...

**FAUX AMIS, FAUX PARENTS,
"ETRANGERS", 62 paĝoj, 15FF.
SAT-Broŝurservo, 1990.**



Kiu franco, lernanto de Esp-o, ne konstatis unuavide, ke multaj esperantaj radikoj similas francajn vortojn? Kaj kiu ne emis, ne konante vorton, simple uzi francan vorton anstataŭigante la francan finaĵon per la taŭga E-finaĵo? Povas okazi, ke tiu metodo funkcias, de tempo al tempo, sed pli profunda scio de la lingvo montras, ke en multaj kazoj la simileco kun la franca lingvo unuavide konvena, estas fakte tre insida kaj kiam E-vorto tro similas al franca vorto endas duoble atenti.

La ĵus eldonita vort-kolekto de VALO povas esti tiurilate grava ilo por pliprofundigi siajn konojn per sistema studado de tiuj insidaj vortoj. Ĝi konsistas el tri partoj : la unua parto "**FALSAJ AMIKOJ**" traktas la vortojn, kiuj similas francajn vortojn, sed ne havas la saman sencon ; por ĉiu vorto oni trovas tradukon kaj klarigon de la kaptilo (ekz.: **cimo** : punaise, et non cime, **supro**).

La dua parto listigas la "**FALSAJ PARENCOJ**", t.e. "vortojn en esperanto, kiuj estas inter si similaj sed ne estas samsencaj". (**agordo/akordo** ; **alo/aleo**) ; kaj la tria la "**FREMDULOJ**", t.e. la esperantaj vortojn (relative multaj!) sufiĉe diferencaj de la francaj samsignifaj, por ke ilia signifo ne estu tuj divenebla de la franclingvano."

En la dua kaj tria partoj, VALO nur atentigas pri la malfacilaĵo. La lernemuloj - post propra esplorado - mem kompletigu kraĵone la listojn. Tiel la vortoj pli firme fiksiĝos en la kapoj. Utila ekzerco por tiuj, kiuj intencas trapasi ekzamenojn, sed ankaŭ por ĉiuj, kiuj emas pliriĉigi sian vorttrezoron. Ek al la laboro!...

Katrin'

Gérant/imprimeu: Baudé, F-47340 Laroque. CPPAP 58651